

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

EMOCIA
JUBILEA FESTO

•
ESPERANTO-
INSTRUADO

•
BOTEV VIVAS!...

•
NIAJ VETERANOJ

•
LITERATURAJ
TAGOJ
„PENJO PENEV“

•
LINGVAJ
DEMANDOJ

•
JUBILEAJ
CELEBRADOJ

•
ORIGINALA
VERKARO





La Prezidentaro de la jubilea solenaĵo

Ĉu tiuj bulgaraj esperantistoj, kiuj en la juliaj tagoj de 1907 kunvenis en la malnova bulgara ĉefurbo Veliko Tŕrnovo por la unua fonda kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, eĉ povis revii pri tia disvastigo de la Internacia Lingvo de d-ro Esperanto, pri tiaj akiraĵoj, kiajn ĝi ĝuas hodiaŭ en socialisma Bulgario? Iliaj revoj estis modestaj, sed kiaj fervoro, ilamo, sindonemo kaj entuziasmo brilis en iliaj okuloj, kiam ili, starante, kun arda impeto ekkantis la himnon de l'espero: „En la mondon venis nova sento. . .“!

Tiel ankaŭ ni — iliaj posteuloj — pli ol 500 esperantistoj el ĉiuj partoj de Bulgario, post 80 jaroj, starantaj en la salonego de la Nacia Palaco de Kulturo en la mateno de la 13-a de junio 1987, ekkantis la himnon de l'espero kun hela kredo pri la estonto de Esperanto, pri la realigo de la revoj de ties kreinto d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof! . . .

Ni estis kunvenintaj por celebri du gravajn jubileojn — la 100-jariĝon de la Internacia Lingvo Esperanto kaj la 80-jariĝon de Bulgara Esperantista Asocio — unu el la plej viglaj taĉmentoj de la monda esperantistaro. Nur unu jaron post la apero de la Unua Libro de Esperanto progresemaj kaj scivolaj bulgaraj intelektuloj kaj laboruloj estigis ardaĵ adektoj de la nova lingva fenomeno, trovinte en ĝi plej taŭgan ilon por interkompreniĝo, kunagado kaj amikiĝo kun homoj el diversaj landoj, en la nomo de plej humanaj kaj noblaj idealoj.

Dum sia 80-jara ekzistado Bulgara Esperantista Asocio trairis penigan, dornokovritan, sed gloran vojon, kiu vicigis ĝin inter la plej aktivaj membroj de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La organizado de bulgaraj esperantistoj ĉiam staris sur plej demokratiaj pozicioj, montriĝis kiel principa, arda defendanto de la homaj rajtoj, kontraŭ ĉiu subpremado, kontraŭ rasismaj kaj ŝovinismaj tendencoj. La bulgaraj esperantistoj bone memoras la vortojn de la instruanto kaj gvidanto de nia popolo Georgi Dimitrov, ke „... en la kultura trezorejo de la homaro ne estas grandaj

kaj malgrandaj popoloj — valoras ilia kontribuo al la monda kulturo. . .“ Tiuj nome vortoj permesas al la bulgara popolo fieri pri sia kontribuo al la homa civilizo, al la batalo por konservo de la monda paco, por interkompreniĝo kaj tuthomara prospero.

Tiajn pensojn esprimis en sia malferma parolado antaŭ la solena kunveno Nikola Aleksiev, esperantisto-veterano, heroo de la socialisma laboro, honora prezidanto de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM). Li esprimis ankaŭ la profundan dankon de ĉiuj bulgaraj esperantistoj al la Bulgara Komunistarta Partio kaj al ties Ĝenerala Sekretario Todor Jivkov, pro la alta pritakso kaj pro la ĉiufanka apogo de ilia agado kiel sindonaj padefendantoj kaj ardaĵ patriotoj-propagandantoj de la atingoj de socialisma Bulgario.

En la prezidantaro de la kunveno okupis lokojn la unua vicprezidanto de Patrolanda Fronto Sava Dŕlbokov, la prezidanto de la Komitato por Interkompreniĝo kaj Kunlaborado sur la Balkanoj Boris Velĉev, la reprezentantoj de la Centra kaj Urba komitatoj de BKP Violeta Musakova kaj Georgi Petrov, la vic-ĝenerala sekretario de la Bulgara Nacia Komisiono pri UNESKO Mirĉo Arsov, la reprezentanto de la Ministerio de Popola Klerigo Zarko Gogov, la prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio Hristo Gorov, heroo de la socialisma laboro, membroj de la Buroo de Centra Estraro de BEA.

„Esperanto — lingvo de paco kaj de amikeco“ — tiel titolis sian festan paroladon prof. d-ro Stojan Ĝuĝev, mondfama sciencisto kaj esperantisto, estrarano de la Internacia Scienca Akademio Comenius. Emocie, science argumentite, bildece prof. Ĝuĝev priskribis la lingvan situacion en la mondo: la malfacilaĵojn, kiujn provokas la strebo al lingva (sekve — al ekonomia-politika) hegemonio fare de iuj grandaj ŝtatoj, kiuj volas altrudi al la popoloj siajn naciajn lingvojn. La oratoro parolis pri la centoj da projektoj por kreo de neŭtrala internacia lingvo, inter kiuj sukcesis nur la plej genia kaj plej racia, la kreaĵo de d-ro Zamenhof — la Lingvo Internacia Esperanto, kiu en daŭro de unu jarcento pruvis sian kapablon esti neŭtrala

(Sekvas sur p.2)



Hristo Gorov, prezidanto de BEA, dekoras k-don Sava Dŕlbokov — unua vicprezidanto de la Patrolanda Fronto, per la Ora Jubilea Medalo de BEA.



ESPERANTO-INSTRUADO KAJ NUNTEMPAJ POSTULOJ

Jam estas ĉe la sojlo la nova lernojararo 1987/88. Cu ni pretas komenci ĝin sukcese?

Dum la lastaj jaroj BEA atingis konsiderindajn sukcesojn kaj okupas indan lokon inter la kultur-amasaj organizaĵoj en Bulgario. Gi tamen ne ĉesas strebi al plibonigo de sia laboro. Por plenumi siajn ĉefajn taskojn — plua popularigo de Esperanto, plialtigo de la aŭtoritato de la bulgara E-movado kaj prezento en eksterlando — pere de Esperanto, de la plej signifaj atingoj de Bulgario, BEA devas reorganizi plurajn sferojn de sia agado. Fakte la reorganizo jam komenciĝis — post la pasintjara oktobra plenkunsido de CE de BEA, kiam estis decidita la fondo de nova fako „Instruagado kaj Kvalifikado“. Estas sciata, ke de la stato de instruado dependas grandskale la rezultoj en ĉiuj aliaj agadsferoj — organiza kaj kultura laboro, informado pere de la gazetaro, laboro de la sekcioj k.t.p. Preparo de spertaj esperantistoj, perfekte posedantaj la lingvon certigus sukcesan plenumon de ĉiusecaj taskoj. Jen pro kio BEA komencis la reorganizon per plibonigo de la instruado de Esperanto.

Plej diskutinda nun estas la demando pri kvalito de la Esperanto-instruado. Unualoke staras la problemo pri preparo de spertaj rajthavaj E-instruistoj. Ĉiam ankoraŭ multaj el la lektoroj ne posedas en sufiĉa grado la lingvon, ne scipovas flue paroli ĝin. Ĉio ĉi malhelpas al la kursanoj akiri solidajn lingvokonajn. Malutila estas la praktiko propagandi Esperanton kiel treege facilan lingvon. La kursanoj komencas lerni ĝin kun tiu penso, sed post nelonge ili konvinkigas, ke Esperanto tute ne estas tiel facila. Kaj se la lektoro mem ne regas ĝin bone, la rezultoj estas plorindaj — oni amase forlasas la kursojn, des pli ke malmultaj scias, kiamaniere ili povos apliki siajn Esperanto-konojn.

La lektoro devas ne nur bone posedi la lingvon, krome li devas esti bone informita pri la historio de la bulgara kaj internacia Esperanto-movado, pri la literaturo traduka kaj originale verkita, pri la kontaktoj de UEA kun gravaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj, pri solvo de Esperanto-problemoj en Bulgario, pri penetro de Esperanto en diversajn tavolojn de nia socio.

CE de BEA kaj la Ministerio pri Popola Klerigo aprobis trigradan sistemon de Esperanto-instruado por ekposedo de la lingvo kaj gradon por instrurajto. Vere, en tiu ĉi sistemo povas esti malperfektaĵoj, tamen nun validas ĝi kaj ni devas labori kaj laboras obeante ĝiajn postulojn. Laŭ la sistemo oni instruas la fundamenton de Esperanto, literaturon, historion de la bulgara kaj internacia Esperanto-movado kaj metodikon de instruado de Esperanto. Estas evidente, ke se iu esperantisto ne finis iun el la cititaj gradoj, li ne povus esti bona lektoro, eĉ se li montris perfektajn rezultojn en la aliaj gradoj. Do, oni devas jam ĉesi konfidi la instruadon de Esperanto al personoj, kiuj ne posedas diplomon pri instrurajto. Esploro de la stato de E-instruado en Bulgario montras, ke en multaj distriktoj plenrajtaj Esperanto-instruistoj ne gvidas kursojn, kaj samtempe homoj, kiuj finis trian gradon, eĉ nur duan gradon — gvidas kursojn. Cu ni povus esperi pri ia ajn, eĉ malgranda sukceso en similaj okazoj? Evidente ne! Nur bona lektoro kun vastaj konoj povas sukcese gvidi kurson.

Aliflanke, ekzistas Esperanto-instruistoj, kiuj, posedante diplomon pri instrurajto, opinias, ke ĝi estas garantio pri perfekta lingvoposedo. Sed se tiu diplomo estas akirita antaŭ multaj jaroj, sen konscia memperfektigo, tiuj instruistoj perdas la kapablon sukcese instrui. Ĉiu instruisto de fremda lingvo bonege scias, ke si li ne labo-

ras super la lingvo, por sia memperfektiĝo, la malbonaj rezultoj ne malfruigas. Jen pro kio la konstanta legado de belarta literaturo, la refreŝigo de la lingvaj konoj, la informiteco pri signifaj Esperanto-ĉeventoj estas tre necesaj.

La distrikta estraro de BEA devas atente elekti la lektorojn por siaj kursoj. Tiuj lektoroj devas esti konvenaj por kontaktoj kun la vasta publiko, por kunlaboro kun la Soveto pri Popola Klerigo, kapablaj allogi siajn kursanojn.

Dua grava momento en la Esperanto-instruado estas organizado de la tuta lernoĵaro fare de la distrikta estraro de BEA. Unue, ili devas ĝustatempe lui konvenan ejon, kie oni instruos Esperanton. Tiuj ejoj devas esti certigitaj jam en la fino de la kuranta lernoĵaro. Tio estas ege necesa, ĉar nur kun certaj lektoroj kaj ejoj oni povus fari sukcesan propagandon por novaj kursoj — per taŭgaj afiŝoj, radioelsendoj, leteroj al oficialaj instancoj k.t.p. Due, la distrikta estraro devas fari raporton pri la pasinta lernoĵaro, notante ĉiujn organizajn malperfektaĵojn, disponigante elĉerpajn informojn pri la kursanoj, diplomitoj, lektoroj kaj ties laboro, pri formoj de Esperanto-instruado. Tuj post la raporto oni devas prepari planon por la sekva lernoĵaro, laŭeble pli detalan. En la plano devas esti menciita la tuta bazo, kiun DE havas

je sia dispono. Temas pri lernolibroj, instruhelpiloj k.s.

La distrikta estraro devas esplori la kondiĉojn kaj eblecojn pri organizo de kursoj en diversaj kultur-amasaj organizaĵoj, kulturdomoj, fabrikoj, junularaj organizaĵoj. Se tiaj eblecoj ekzistas, oni devas peti kunhelpon fare de ties gvidorganoj kaj poste tre atente elekti lektorojn. DE devas utiligi ĉiujn eblecojn por altiri novajn esperantistojn kaj proponi al ili interesajn arangojn konforme al iliaj interesoj, klerco, aĝo.

Kaj fine, sed ne lastloke, staras la demando pri respondeculoj pri la Esperanto-instruado. Eĉ la plej bone aganta DE ne havus kontentigajn rezultojn en la instruado de Esperanto, se ne estas persono, kiu respondecas pri ĝi. Kunlabore kun Esperantaj kaj neesperantaj estraroj, li povus atingi kontentigajn rezultojn.

Se la distrikta estraro, la respondeculoj pri E-instruado kaj la lektoroj prenus en konsidero ĉion supre diritan, sukcesoj nepre estos kaj ni alproksimiĝos al la dezirata profesinivela laboro.

Sukcesan komencon de la nova lernoĵaro!

Nedka VALJAVIČARSKA,

Sekretario de fako
„Instruado kaj Kvalifikado“ ĉe BEA

Emocia jubilea festo



Solena parolado de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev:
„Esperanto—lingvo de la paco kaj amikeco“.

Fotoj: Borislav Skočev

(Daŭrigo de p. II)

lingvo-ponto. En ĝi estis kreita originala literaturo, ĝi helpis la vastan diskonigon de verkoj de sciencistoj kaj verkistoj el la tuta mondo. Hodiaŭ ĝi estas parolata kaj aktive uzata de pli ol 18 milionoj da homoj el ĉiuj partoj de la mondo. Esperanto estiĝis lingva interligilo por paca kunlaborado kaj amikeco inter la popoloj! Tial hodiaŭ la esperantistoj el ĉiuj landoj esprimas ankoraŭfoje sian profundan estimon kaj dankon al la kreinto de Esperanto, kiu donacis al la homaro plej

belan kreaĵon, kies 100-jaran jubileon la mondo celebras ĉi-jare.

Starante, la ĉeestantoj ŝtorme aplaudis la paroladon de prof. Ĝuĝev. Al la solena festa etoso multe kontribuis la majstraj plenumoj de la versaĵoj „La vojo“ de L. L. Zamenhof far la popola aktorino Margarita Duparino kaj „Tagiĝo“ de Antoni Grabowski far la aktorino Ginka Toteva el BET, la muzika programo de la Ĥoro de Sofia Esperantistoj kaj de kvarteto „Orbita“. Agrabla surprizo por ĉiuj estis la improvizita salutparolado de la gasto de BEA Dang Dinh Dam — sekretario de Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio, kiu, kantante belan vjetnaman kanton, salutis la ĉeestantojn okaze de la 80-jara jubileo de BEA kaj la 100-jariĝo de Esperanto — en la nomo de la vjetnamaj esperantistoj.

Emocia momento estis la dekorado per la jubilea medalo de vico da bulgaraj esperantistoj-veteranoj kaj aktivuloj de la bulgara Esperanto-movado, kiujn la prezidanto de BEA Ĥristo Gorov, varme gratulis pro la alta distingo kaj bondeziris al ili fortan sanon kaj pluan aktivadon por la prospero de Esperanto, por la disfloro de nia socialisma patrolando.

Docento Cano Ignev, membro de la Buroo de CE de BEA, tralegis telegramon al la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio en la nomo de la jubileantaj bulgaraj esperantistoj, kiuj esprimas korvarman dankon pro la zorgoj kaj helpo de la partio kaj de la popola registaro al la bulgara Esperanto-movado kaj firme deklaras, ke ili plu estos en la unuaj vicoj de la pacdefendantoj kaj de la konstruantoj de socialisma Bulgario.

Donĉo ĤITROV

Botev vivas en niaj koroj!...



Kantgrupo el 4-a mezlernejo „Nikola Vapcarov“ — Sofio

Foto: Samuil Milev

La 30-an de majo ĉi-jare en Vraca regis vigla E-
toso: en la salono de Distrikta Junulara Domo ver-
dis rubandoj kun la slogano „100 jarojn Esperanto“
kaj bukedetoj el geranio sur la brustoj de pli ol 200
partoprenantoj kaj gastoj de la VII Konkurs-Reci-
talo de Boteva kaj Revolucia Poezio en Esperanto.
Kiel kutime, la arango okazis enkadre de la tradiciaj
kulturaj festoj „Botev-tagoj '87“, dediĉitaj al la Tago
de Botev kaj de la pereintoj en la batalo kontraŭ
la osmana jugo, kapitalismo kaj faŝismo kaj en la
Patrolanda Milito.

La Konkurs-Recitalon partoprenis 35 individuaj
kaj 3 kolektivaj plenumantoj el 18 loĝlokoj en Bul-
gario — precipe gejunuloj, adorantoj de la sen-
morta poezio de la granda revoluciulo kaj interna-
cisto Ĥristo Botev.

Naskita antaŭ 139 jaroj, kiam Bulgario ĝemis sub
osmana jugo, Botev tamen restas ĉiam juna en la
bulgaraj koroj. Lia poezio estas tre aktuala ankaŭ
nun, en la kondiĉoj de reala socialismo en Bulgario.
Ĝi estas senmorta kaj nevelkanta, ĉar ĝi respegulas
la sopirojn kaj impeton al libero de niaj antaŭuloj
en rimarkinda epoko — la 60-aj kaj 70-aj jaroj de la
pasinta jarcento, kiam en Bulgario viglis bataloj por
nacia liberigo kaj socia justeco. La poezia ver-
karo de Ĥristo Botev estas inspirita de lia revolucia
ideologio, ĝi estas signita de liaj heroaĵoj kaj legenda
morto, kaj nome tio donas al ĝi allogan ĉarmon. Por
ni Botev estas pura kaj senprofita batalanto por ho-
maj rajtoj, sentima heroo, kiu iras al morto por la
libero de sia popolo. Ĉe li faroj kaj paroloj estas ne-
disigeblaj. Li skribis: „Ne ekzistas regpotenco super
kapo, kiu pretas apartiĝi de la ŝultroj en la nomo de
la libereco kaj por la bono de la tuta homaro“. Kaj,
estante nur 28-jara, li mem oferis sian vivon en la
batalo por tiu ĉi libero.

Cefaj motivoj en la poezio de Ĥristo Botev estas —
amo al la patrujo, kredo je la justa afero de l'popolo,
je la senmorteco de l'pereintaj herooj, kredo je la
triumfo de l'justeco super la mensogo, de l'vivo super
la morto. Sed plej proksima al ni estas Botev pro liaj
mondkonceptoj, kiuj kondukis lin al la ideo pri ra-
dikala ŝanĝo de la tiama maljusta socio. Per siaj kon-
ceptoj pri sociala konstruo de l'socio li superis siajn
samlandanojn kaj leviĝis ĝis socialaj postuloj, por

kiuj en la Osmana Imperio, al kiu estis tiam alligita
Bulgario, ne ekzistis kondiĉoj. Lia penetrema rigar-
do estis direktita al la malproksima estonto, kiu devis
veni post la realigo de nia nacia revolucio kaj ties
taskoj.

Dum la solena anonco de la premiitoj de la VII
Konkurs-Recitalo, okazinta la 31-an de majo en la
Urba Artgalerio, la merita aktorino Gertruda Lukano-
va — prezidantino de la jurio, varme salutis la plenu-
mantojn kaj faris iujn rimarkigojn cele al pli bona
estonta preparlaboro. Si alvokis al okazigo de di-
strikta konkursoj-recitaloj, en kiuj oni elektu la plej
bonajn plenumantojn por partopreno en la Botev-Re-
citalo en Vraca: ŝi substrekis la neceson pri kompeten-
ta helpo fare de profesiaj pedagogoj kaj regisoroj;
atentigis, ke la plenumantoj ne devas stari senmove,
sed per emociaj gestoj kaj mimiko ili direktu sian
plenumon al la publiko. Oni devas labori — ŝi di-
ris, — por eviti la malbonan elparolon kaj reduktion
de vokaloj. Estas bone, ke la konkursantoj estonte
pliampleksigu la nombron de plenumataj versaĵoj de
aliaj revoluciaj poetoj kaj turnu atenton al la oratoraj
plenumoj (krom versaĵoj de Botev, en la ĉi-jara kon-
kurs-recitalo sonis nur kvin versaĵoj de N. Vapcar-
ov, V. Markovski, L. Levĉev, A. Stojanov, kaj nur
unu oratora plenumo).

Enkadre de la Konkurs-Recitalo okazis interesaj
programeroj. Dum solenaĵo okaze de la 100-jariĝo de
Esperanto Petăr Todorov, vicprezidanto de CE de
BEA, salutparolis kaj enmanigis Jubilean Medalon
„100-jarojn Esperanto“ al meritaj veteranoj de la E-
movado en Vraca-distrikto. Poste kantis la juna te-
noro Todor Atanasov el Jambol kaj estis prezentita
fare de la Vraca Pupteatro la pusppektaklo „Etaj pup-
okazintaĵoj“ de Rada Moskova, regisoro Verginia Pav-
lova. Estis organizita ekskurso al la proksime situanta
groto „Ledenika“, kie okazis koncerto de la ĉambra
ensemblo „Madrigal“.

Indas menci la ĉeeston de junaj geesperantistoj el
Hungario, GDR, Pollando kaj Bulgario, kiuj partop-
renis en junulara renkontiĝo enkadre de la Konkurs-
Recitalo. Ĉeestis ankaŭ du vjetnamaj gastoj, kiuj
elkore dankis pro la varma akcepto kaj donacis al la
organizantoj afiŝon de vjetnama pentristo, dediĉitan
al la Botev-Recitalo.

Por la bulgara popolo Ĥristo Botev estas supro de
la nacia poezio, mobilizanta ekzemplo kaj fonto de
pura inspiro. Sed Botev apartenas ankaŭ al la tuta
progresema homaro, batalanta por nova vivo, por po-
pola feliĉo. Devo de la bulgaraj esperantistoj estas
popularigi la heroaĵojn, la poezion kaj ideojn de Botev
kiel revoluciulo, patrioto kaj internaciisto, fari la
tradician Botev-Recitalon vera festo por la bulgaraj
kaj eksterlandaj esperantistoj.

Evgeni GEORGIEV

PREMIITOJ DE LA VII KONKURSO-RECITALO DE BOTEVA KAJ REVOLUCIA POEZIO

GRANDA PREMIO — ne estas aljuĝita

I. INDIVIDUAJ PLENUMANTOJ

UNUA PREMIO — laŭreata diplomo kaj objekta donaco
estas aljuĝita al:

- Tatjana Panĉeva — Vraca
- Galja Angelova — Plovdiv
- Nina Pekina — Vâlĉedram, distrikto de Miĥajlovgrad.

DUA PREMIO — laŭreata diplomo kaj objekta donaco:

- Milena Janeva — Jambol
- Maja Coneva — Varna
- Silvija Karčeva — Miĥajlovgrad

TRIA PREMIO — laŭreata diplomo kaj objekta donaco:

- Plamena Cvetanova — Vraca
- Rumjana Bogdanova — Orjaĥovo, distrikto de Vraca.

PREMIO de la Distrikta Komitato pri Pacdefendo — Vraca, estis aljuĝita al:

- Temenujka Karapančeva — Samokov, distrikto de Sofio

PREMIO de la Distrikta Komitato de Komsomolo — Vraca, estas aljuĝita al:

- Galina Denčeva — Ŝumen

KVIN PREMIOJN de la Distrikta Estraro de BEA — Vraca, oni aljuĝas al:

- Veselin Draganov — Vraca
- Biser Petkov — Gorna Orjaĥovica
- Emilija Slaveva — Sofio
- Ivan Paraškevov — Jambol
- Petja Stefanova — Sofio

Literaturan almanakon „Okolčica“ ricevas Cvetanka Gjunderska — Kostenec, distrikto de Sofio.

II. ARTKOLEKTIVOJ

UNUA PREMIO ne estas aljuĝita

DUA PREMIO — laŭreata diplomo kaj objekta donaco, estas aljuĝita al:

- Grupo por Arta Parolo — Elin Pelin, distrikto de Sofio, kun artgvidantino Ivanka Bošnjakova.

TRIA PREMIO — laŭreata diplomo kaj objekta donaco:

- Grupo por Arta Parolo ĉe E-Societo „Eterna Amikeco“ — Pleven, kun artgvidantino Antoaneta Kovačeva.

PREMIO de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto — Vraca:

— Grupo por Arta Parolo ĉe Sofia Universitato „Kliment Ťhridski“ — Sofio.

DU PREMIOJ de la Distrikta Komitato pri Pacdefendo, al:

- Infana Ĥoro el Vraca kun artgvidantino Veska Petrova.
- Reprezenta Infana Ĥoro el Miĥajlovgrad.

PREMIO de la Distrikta Centro „Standardo de la Paco“ — Vraca, al:

- Amatora Teatra Trupo ĉe E-Societo „Vekigo“ — Ŝumen, kun artgvidantino Neli Georgieva, pro prezento de la teatraĵeto „Rumena vojevodo“ de N. Dimitrova.

PREMIO de la Centra Estraro de BEA, al:

- Kantgrupo el 4-a lernejo „N. Vapcarov“ — Sofio, kun artgvidantino Viktoria Jotova

PREMIO de DE de BEA — Vraca, al:

- Kantgrupo — Jambol

Literaturan almanakon „Okolčica“ ricevas la partoprenantoj en Grupo por Arta Parolo ĉe lernejo „V. Levski“ — Dimitrovgrad, kun artgvidantino Jana Georgieva.

PREMIO — senpaga jarabono al revuo „Bulgara Esperantisto“ por 1988, estas aljuĝita al:

- E-Societo — Bjala Slatina, distrikto de Vraca, pro ĝia kompleta sinprezento en la Botev-Recitalo '87.

JURIO:

Prezidantino: merita aktorino GERTRUDA LUKANOVA, popola aganto de arto kaj kulturo

Membroj: Angelina Sotirova
Kunĉo Vălev

Stojan Pavunčev

Ljubomir Trifončovski

k.t.sc. inĝ. Kiril Velkov

Valentin Paskalev

Snejinka Angelova

Juna esperantisto

NIA ALVOKO

Ci-jare urbo Vraca estis gastiganto ne nur de la partoprenantoj en la Recitalo de Boteva kaj Revolucia Poezio, sed ankaŭ de arango, organizita de la estraro de Bulgara Esperanto-Junularo. La komitatkun-sido de BEJ (30. 5. 87), gvidita de Mariana Elenova — vicprezidantino de la sekcio, transformiĝis en sinceran, interesan kaj utilan interparolon de la gejunuloj. Post la priagada raporto (por la periodo 15.06.85 — 30.05.87) komitatanoj de BEJ, respondecaj pri la junulara agado ĉe la distriktaj estraroj en la lando, aktivuloj el diversaj landregionoj kaj junaj partoprenantoj en la recitalo eldiris sian opinion pri tiklaj demandoj de la junulara E-movado, konfesis sian ĝojon pro la sukcesoj kaj maltrankvilon pro la problemoj en ilia urbo aŭ distrikto.

En la nomo de la estraro de BEJ mi ŝatus danki al niaj plej aktivaj kaj diligentaj junularaj respondeculoj: Svetlana Veleva — Ruse, Emilija Pejčinova — Plovdiv, Vanja Miĥajlova — Burgas, Marina Uzunova — Haskovo, Valja Petrova — Vraca, Nevjana Kreteva kaj Dimităr Dimitrov — Sofio. Kvankam iuj el ili nur de kelkaj monatoj respondecas pri tiu ĉi agado, ili jam bone orientiĝis kaj vikle ekagis man-manen kun la distriktaj estraroj. Interesa kaj ĝojiga estas ekzemple la fakto, ke DE de BEA en Ruse ĉi-jare donis monpremion al la junulara grupo pro ĝia aktiva laboro.

En ĉiuj supre menciitaj lokoj la ligo junularaj grupoj — distriktaj estraroj, funkcias tre bone. La DE helpas ĉiurilate kaj ĉiamaniere — morale kaj finance, la gejunulojn kaj jen jam venas rezultoj — vigla kaj rezultodona junulara agado! Ni dankas al tiuj estraroj pro ilia komprenemo al la junularaj problemoj kaj pro ilia helpo!

Sed, bedaŭrinde, la rezultoj ne ĉie estas kontentigaj, ne ĉie estas konstatebla zorga rilato al la junularaj grupoj flanke de la distriktaj estraroj. Ekzemple, partoprenanto el Miĥajlovgrad, tre maltrankviligita, starigis antaŭ ni tiun ĉi problemon. . . Ankaŭ en Blagoevgrad-distrikto junulara E-agado preskaŭ ne ekzistas, ĉar la sola membro de DE D. Tončeva, kiu helpadis kaj subtenadis la lokan E-junularon, nun pro seriozaj kaŭzoj ne povas okupiĝi pri la E-movado. . .

La kaŭzoj pri tia stato de la aferoj? Ĉu la distriktaj estraroj ne konscias, ke la junularo estas la estonto de nia E-movado?! . . . Ni direktas nian insistan alvokon al ĉiuj distriktaj estraroj en la lando. Karaj estraranoj, prizorgu kaj helpu la aktivadon de niaj junaj esperantistoj!

Fakte plej ĝojiga por ni estas tio, ke la gejunuloj montris tre vigan intereson al la problemoj, diskutis, interŝanĝis sperton, opiniojn, faris proponojn por plibonigo de la laboro. Kaj ni esperas, ke tiu ĉi renkontiĝo donos siajn fruktojn por disfloro de la junulara E-movado en la tuta lando dum la jubilea jaro!

Mariana ELENOVA,
vicprezidantino de BEJ



Vasja Cvetkova jubileas

junularaj festivaloj. Tre ofte ŝi estis gvidantino de la kulturaj programoj de solenaj kunvenoj, celebradoj k.s., organizataj de societo „M. Gorkij“.

Kun Vasja Petrova-Cvetkova mi konatiĝis antaŭ pli ol tridek jaroj. Mi bonege rememoras tiun kurson de Esperanto por civitanoj, kiun mi ekgvidis en la aŭtuno de 1955, en la modesta saloneto sur str. „Aksakov“ 14, kie okazis tiutempe ankaŭ niaj urbaj E-kunvenoj. Inter la ĉirkaŭ dudek gekursanoj de diversaj aĝo kaj profesio, jam en la komenco elstaris du junulinoj — Vasilka Petrova (aŭ Vasja, kiel ĉiuj nomas ŝin) kaj ŝia nedisigebla tiam amikino Julia Staevska — ĵus finintaj la mezan lernejon, tre diligentaj kaj kapablaj. Por ili Esperanto fariĝis sorto. Nur post 4—5 jaroj Julia edziniĝis al itala esperantisto kaj ekloĝis en Padovo, kie ŝi kreskigis du denaskajn geesperantistojn.

Kaj Vasja? Por ŝi Esperanto fariĝis ne nur ideo, sed ankaŭ profesia laborkampo. De 1961 ĝis 1979 ŝi laboris kiel administra sekretario en la kancelario de BEA kaj poste — en la administracio de la Internacia Esperanto-Kursejo kaj en la Ekonomia Direkcio de BEA „Globus“. En 1985 ŝi eklaboris kiel sekretario de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM). Do, jam 26 jarojn Vasja laboras profesie sur la E-kampo kaj ŝi povas fieri pro sia specifa ĉampioneco — esti la plej multjara profesia aganto de BEA, tiurilate eble ankaŭ dojeno tutmonde.

Sed Vasja laboris tre aktive por Esperanto ankaŭ eksterlande. Jam kursanino, ŝi estigis unu el la plej energiaj junaj aktivulinoj de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“, entuziasme eklaboris en la vicoj de la E-junularo, partoprenis la organizadon de junularaj kunvenoj, renkontiĝoj, konferencoj, festivaloj k.a. Plej intime ŝi kunlaboris kun du generacioj de junaj E-agantoj, tiam plejparte studentoj en Sofio kaj nun gvidaj personoj aŭ aktivuloj de BEA en diversaj urboj de la lando.

En la junulara E-medio Vasja famiĝis kiel bona deklamanto. Kelkfoje ŝi gajnis altajn premiojn en

Vasja aktivis ankaŭ inter la virinoj-esperantistinoj kaj dum la lastaj jaroj ŝi estas sekretario de la Virina Sekcio de BEA. Dum kelkaj jaroj ŝi estis bibliotekistino de societo „M. Gorkij“, partoprenis regule en la laborbrigadoj por konstruo de montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa, longe estis korektanto de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“, de revuo „Paco“ kaj „Bulgarino“, de diversaj aliaj eldonoj de BEA. Aparte notinda estis ŝia laboro kiel centra administranto de „Paco“ — oficiala organo de MEM. Ŝi grave kontribuis por la sukceso de la lastjaraj kampanjoj por kolektado de subskriboj por paco: en la unua — iniciatita de la britaj kvakeroj-esperantistoj, en nia lando estis kolektitaj 103 000 subskriboj, transdonitaj oficiale al UN fare de prof. d-ro H. Tonkin, kaj en la dua — la bulgaraj esperantistoj kolektis 148 000 subskribojn sub la Alvoko de Hiroŝima kaj Nagasaki por malpermeso de la nukleaj armiloj, por malarmado kaj daŭra paco en la mondo. Tiuj kampanjoj havas gravegan signifon ne nur pro tio, ke ili plifortigas la voĉon de la pacamaj fortoj en la mondo, persone engaĝante la civitanojn en la pacbatalo, sed ankaŭ pro tio, ke ili konsiderinde kontribuas al la popularigo de nia lingvo kaj de la noblaj celoj de nia movado inter la vastaj popolamasoj kaj la ceteraj amasorganizoj — Patrolanda Fronto, Komsomolo, Sindikatoj, pacdefendaj komitatoj k. s.

Dank' al la bonega laboro de Vasja Cvetkova la X Generala Konferenco de MEM en Aŭgsburgo (1985) elektis ŝin sekretario de tiu aparte grava kaj ĉiam aktuala organizaĵo.

Dum la lastaj jaroj Vasja ekstaris antaŭ ni kiel bona preleganto. En 1982 ŝi vizitis FRG, kie prelegis en 5 urboj pri la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato kaj pri la Internacia E-kursejo. En la sekva jaro, responde al invito de Japana Pacdefenda Esperanto-Asocio (JPEA) ŝi forveturis al Japanio. Tie ŝi prelegis kun granda sukceso en 18 kunvenoj (el kiuj 5 por civitanoj-neesperantistoj, kun traduko) en la urboj Tokio, Jokohama, Kameoka, Hiroŝima, Fukuoka, Nagasaki, Osaka, Nagoja, Numazu, Takacki k.a. Ŝiaj prelegoj tuŝis la temojn: „La bulgara MEM-movado“, „Laborantaj virinoj en Bulgario“, „1300-jara Bulgario“,

„La IEK en Pisanica“. La prelegoj vekis grandan intereson, kaj en la gazetaro — Esperanta kaj neesperanta, — aperis multaj reeĥoj. La japanaj esperantistoj multoblis ŝian prelegon „Laborantaj virinoj en Bulgario“ kaj dissendis ĝin al ĉiuj E-grupoj en la lando. Tiun prelegon oni surbendigis kaj ĝi aperis ankaŭ en „Socia revuo“ — organo de la komunistarupo en Osaka. Aparte estis surbendigita la materialo „Vasja Cvetkova deklamas“.

Alte pritaksis ŝian prelegvojaĝon la estraro de JPEA. En oficiala letero al BEA oni skribas: „... Ŝia klara prononcado kaj lingvaĵo facila ankaŭ por komencantoj, altiris la atenton al MEM en nialanda Esperantujo. Ne nur esperantistoj, sed ankaŭ ĵurnalistoj interesiĝis pri ŝia aktivado kaj pri ĝi aperis materialoj en pluraj japanlingvaj ĵurnaloj. Fakte ŝia vizito multe kuraĝigis nin, esperantistojn en MEM. Plie, ŝia saĝa kaj sprita parolado konvinkis tiujn, kiuj havas dubon pri socialismo, ke via registaro helpas ne nur la popolan vivon, sed ankaŭ la Esperanto-movadon, kion la nia neniam provis ĝis nun“.

Reveninte Bulgarion, Cvetkova aperigis multajn materialojn bulgarlingve kaj en Esperanto pri Japanio kaj pri la batalo de ĝia popolo por paco (en j. „Rabotničesko delo“, j. „Oteĉestven front“, revuo „Oteĉestvo“, en „Bulgara Esperantisto“, „Paco“ k. a.). Ŝiaj impresoj pri Japanio ĵus aperis ankaŭ libroforme. Vasja parolis pri Japanio kaj projekciis diapozitivon pri ĝi en kunvenoj de pluraj E-societoj — en Sofio, Ŝumen, Sliven, Jambol, Gabrovo, Drjanovo, Pernik, Botevgrad, G. Orjahovia, Haskovo, Kjustendil, Bankja k. a. Ĉie la kunvenoj estis iniciatitaj de la E-societoj kaj efektivitaj kune kun la amasorganizaĵoj.

En 1984 Cvetkova estis invitita prelegi en Nederlando. Ŝi prelegis tie en 10 urboj kaj en Belgio — en 3 urboj. Ankaŭ el tiuj landoj venis tre bonaj reeĥoj pri ŝia prelegvojaĝo.

Pli ol 30 jarojn Vasja Cvetkova dediĉis al Esperanto. Kaj ni sincere aliĝas al la vortoj de k-do William Gilbert, multjara eksa ĝenerala sekretario de MEM, kiu en 1984 skribis al ŝi: „Vi estas vera ambasadoro de la paco kaj de via lando...“

Vasilka Cvetkova, Vasja, estas imitinda ekzemplo por ĉiuj esperantistoj. Mi sincere bondeziras al ŝi ankaŭ estonte labori same tiel bonrezulte por Esperanto, por la noblaj ideoj de la E-movado.

Kunĉo VÁLEV



LA NEFORGESEBLA MARIA GAVRILOVA

Maria Ivanova Gavrilova estas unu el la pereintaj esperantistinoj-antifaŝistoj. Ŝi naskiĝis la 10-an de aprilo 1912 en Etropole. Elementan lernejon studis en sia naskiĝurbo, finis gimnazion en Orhanie (nun Botevgrad), studis historion en la Sofia Universitato. En la universitato ŝi eniris la vicojn de la klasbatala studenta popola unuiĝo (BONSS) kaj partoprenis la batalon de la progresema popola studentaro. Pro ŝia elstara aktivado en la batalo ŝi estis altirita kiel kunlaborantino de la Centra Komitato de la nelegala Bulgara Komunisto Partio.

Venis tamen la malfeliĉo. Dum la dua jaro de ŝia universitata studado ŝi grave malsaniĝis je osta tuberkulco. Tutajn ok jarojn ŝi kuŝis preskaŭ senmove en ĝipso. En portilo ŝi estis veturigata al la hospitaloj en Stara Zagora kaj Varna. Sed ŝi ne senesperigis. La tagojn ŝi plenigis per legado kaj manlaboro. Legis librojn, gazetojn, leterojn. Denaska propagandistino, oni ŝin volonte aŭskultis — kolegoj-malsanuloj, medicinista personaro, vizitantoj. Kaj en la hospitalo, kaj hejme ŝin ĉiam vizitadis ĝejnuloj, plenaĝuloj. En la tempo, kiam ŝi kuŝis hejme, ŝi fakte gvidis la agadon de la klaskonscia junularo, kontribuis al la aktivado de la loka organizaĵo de BKP en sia naskiĝurbo Etropole.

Krom la lingvojn rusa kaj franca Maria scipovis ankaŭ Esperanton. Pri ĝi ŝi eksciis hejme — ŝia frato Gavril kaj la fratino Ivanka praktikis la lingvon. Kiel studentino ŝi amike rilatis al Bulgara Laborista Esperantista Asocio (BuLEA) kaj disvastigis ĝian organon, la gazeton „Mejdunaroden Ezik“ (poste „Mejdunaroden Rabselkor“). Sed Esperanton ŝi ellernis en la hospitalo en Varna. Ŝi mem obstine lernis aŭtodidakte, kaj poste instruis Esperanton al grupo da malsanuloj. La grupo sufiĉe progresis en la lernado kaj kiam Maria estis translokigita en la hospitalon en Stara Zagora, ŝiaj novaj kursanoj en tiu hospitalo vigle

ekkorespondis en Esperanto kun siaj kolegoj-malsanuloj el Varna kaj tio tre vigligis ilian tedan kaj turmentan vivon.

Reveninte en 1938 en Etropole, kvankam ankoraŭ surlite, ŝi instigis progresemajn junulojn lerni la Internacian Lingvon. Arda adepto de la ideo fariĝis Ivan Vraĉev, nun konata sociaganto, tiam metiisto. Ĉar ne eblis, ke la tuta grupo (15 personoj) vizitadu ŝian hejmon, ŝi elpensis specialan metodon por instrui. Jen kion rakontas nun Ivan Vraĉev. „Mi vizitadis Marian, ŝi instruis al mi la lecionon, atente ekzamenis kaj instrukciis min, kiel mi mem transdonu la konojn al aliaj amikoj. La renkontiĝo kun ŝi pasis kiel tre agrabla kaj amuza interparolado“.

La junuloj ellernis kontentige la lingvon. Ofte sur la strato oni aŭdis esperantan parolon. Komenciĝis internacia kaj enlanda korespondado. Maria penis organizi publikan esperantan vesperamuzon, sed la polico ne permesis tion. Ivan Vraĉev rememoras, ke al li estis komisiite reciti la versaĵon „Mia preĝo“ de Hristo Botev. Eĉ nun sur la tablo en ŝia ĉambro oni povas vidi la lernolibron de Esperanto, per kiu ŝi instruis la Internacian Lingvon.

Ĉiuj ĝejnuloj, al kiuj Maria instruis Esperanton, aktive partoprenis la batalon kontraŭ faŝismo. Kvar el ili: Ivan Vraĉev, Pejo Krinĉev, Jonka Krinĉeva kaj Aleksandâr Petkov fariĝis partizanoj kaj batalis por la popola libero. En la batalo pereis Pejo Krinĉev kaj Aleksandâr Petkov.

Dum 1940-1941 la sanstato de Maria iom pliboniĝis. Ŝi estiĝis kontistino en la urba konsumkoopertivo. Tiu ofico permesis al ŝi disvolvi streĉan nelegalan revolucion agadon. Ŝi estis elektita membro de la Regiona Komitato de BKP kaj en la urba partia estraro. Kiam komenciĝis la perarmila batalo de la popolo, ŝi plektis la reton de partizanhelpanoj, havigis nutraĵon por la partizanoj el la glora taĉmento „Ĉavdar“, mem akceptis kaj kaŝis partizanojn. En decembro 1943 la polico faris amasajn arestojn en la regiono. La loka lernejo fariĝis policarestejo, kie oni turmentis la arestitojn. Maria Gavrilova estis arestita la

17-an de decembro. Malgraŭ la terura turmentado ŝi denunciis neniun. Kiam antaŭ ŝi la policianoj starigis perfidulcn, ŝi kuraĝe kraĉis lin.


En la nokto de la 31-a de decembro 1943 la policianoj kondukis al montpasejo „Arabakonak“ 17 gearestitojn, kaj en la novjara nokto mortpafis ilin. Inter ili estis ankaŭ Maria.

Post la liberigo la ostoj de la herooj estis enterigitaj en la Frata Tombejo en Etropole. En la urbo estas monumento de la heroino-esperantistino Maria Ivanova Gavrilova. Sian nomon nun portas infangardeno, junpioniraj taĉmentoj, Komsomola societo — omaĝe al ŝia imitinda vivo.

Ivanka GAVRILOVA

Niaj veteranoj

KALJO BJANDOV — 70-JARA



Kaljo Bjandov estas naskita la 1-an de januaro 1917 en vilaĝo Dragovo, distrikto de Burgas, en

malriĉa familio. Lia patro pereis en la Unua Mondmilito.

De 1927 ĝis 1932 li lernas en urbo Karnobat kaj poste — en la Ekonomika Lernejo en Sviŝtov kaj en la Ekonomika Instituto en Varna. Depost 1941 laboras kiel bankoficisto en urboj Balĉik kaj Burgas.

De 1933 li estas membro de RMS, kaj de 1944 — de BKP.

Post la popola venko en 1944 li laboras kiel lektoro en la Distrikta Partia Lernejo — Burgas, en la oficistaro de DK de BKP, en la Distrikta Konsilantaro. Tio estas jaroj de honesta laboro kaj plenumita civitana devo.

Esperanton nia kara baj Kaljo lernis jam kiel lernanto en Sviŝtov — en kurso gvidata de lia samklasano Nikola Panĉev el Loveĉ.

En 1970 Kaljo Bjandov estas elektita kiel prezidanto de DE de BEA en Burgas. Sur tiu ĉi posteno li laboras aktive kaj vikle en la E-movado. En 1984 li estas elektita kiel honora prezidanto de DE de BEA kaj membro de CE de BEA. Nun li estas honora membro de CE de BEA.

Multajn jarojn Kaljo Bjandov kolektas materialojn pri la E-movado en Burgas-distrikto. Nun tiu senlaca homo verkas libron pri la historio de la esperantistaro en Burgas. Per sia konstanta agado la fidela verdstelano donas al ni ekzemplon de junece spirito kaj agemo.

Nikola STRANĜANSKI

GRATULOJN, BELKA!

La 17-an de junio j.k. esperantistoj el la ĉefurbo, multnombraj gastoj kaj amikoj de Esperanto ĉeestis Renkontigon kun la aktorino el Bulgara Esperanto-Teatro (BET) Belka Beleva, okaze de ŝia 60-jariĝo kaj 30-jara fruktodona teatra kaj socia agado.

Per siaj plenumoj en la arta programo salutis la jubileulinon, la aktorinoj Angelina Sotirova, Hrisula Garili kaj Veneta Zjumbjuleva, la kantistino Maria Angelova, la pianistino Snejana Barova kaj du junaj geaktoroj, studentoj el la Supera Teatra Instituto (VITIZ) — lernantoj de Belka Beleva. Unu el ili estis Borjana Maneva, filino de la aktoro Georgi Georgiev, rolulo en la unua spektaklo de BET en 1959 — „Casistoj de oficoj“ de Ivan Vazov.

Al la 100-jariĝo de Esperanto Belka Beleva dediĉis sian libron „Teatro sen lingva bariero“, en

kiu ŝi priskribas sian kaj de ŝia vivkunulo Anani Anev 25-jaran teatran agadon. Fragmentojn el la libro tralegis Nedka Valjaviĉarska.

Post la sinprezento de muzika duo R.Doĵĉinov — N.Rakovski (violonĉelo kaj violono), B. Beleva deklamis Esperante „Soneton“ de Sekspiro kaj eltrojaĵojn el „En milda aŭtuno“ de Valeri Petrov.

Krean portreton de nia estimata aktorino faris prof. Kiril Popov, prezidanto de UE de BEA, detale sekvante en sia parolado ŝian longan kaj utilan vojon de aktoriĝo kaj aktivulino sur la Esperanto-kampo.

En la nomo de CE de BEA, ĝia prezidanto Hristo Gorov gratulis la jubileulinon kaj deklaris ŝin per la jubilea medalo „100 jarojn Espe-

ranto“.

Ivan Peev, sekretario de UE de BEA, dekoris Beleva per la „Honora Insigno“ de BEA. La direktoro de la Internacia Esperanto-Kursejo ing. Angel Todorov enmagnigis al ŝi la jubilean Simbolon de IEK.

Por gratuli la jubileulinon venis multaj ŝiaj amikoj kaj kolegoj. Multaj bonaj, laŭdaj vortoj estis diritaj, multaj belaj floroj ornamis la solenajon de Belka Beleva — floroj de ŝiaj kolegoj el BET, de la Virinkomisiono ĉe BEA, de kolegoj el VITIZ, de multnombraj adorantoj kaj amikoj. . . La aktoriĝo kore dankis al ĉiuj.

Ni gratulas nian karan Belka lige kun ŝia duobla jubileo kaj bondeziras al ŝi sanon, feliĉon kaj ankoraŭ multajn kreaĵn ĝojojn.

Bojidar ALEKSIEV

ESPERANTISTINOJ JUBILEAS



Esperantistinoj-aktivulinoj dum la Jubilea Nacia Renkontiĝo en Jambol

Ankaŭ ĉi-jare, la 16-an kaj 17-an de majo, la bulgaraj esperantistinoj partoprenis sian laŭvican nacian virinan E-konferencon. Ĉi-foje ĝi okazis en Jambol, kiu bonvenigis la delegitinojn kun varma suno, trankvilo kaj gastamo.

La bonega preparo de la konferenca programo kaj la bonaj laborkondiĉoj, proponitaj de DE de BEA multe helpis por brila okazigo de la konferenco dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto. Organizanto de tiu E-iniciato estis la vicprezidanto de DE de BEA Dimităr Hristov. Li estis ĉie helpe al la virinoj — kaj ĉe la stacidomo por renkonti ilin kaj dum la aranĝoj en Elĥovo kaj Jambol.

Tuj post la alveno de la delegitinoj, sabate la 16-an de majo, luksa aŭtobuso veturigis ilin al la apudlima urbo Elĥovo. Tie la esperantistinoj havis emocian renkontiĝon kun la lokaj virinoj. Katja Dobрева, prezidantino de la Movado de Bulgaraj Virinoj ĉe la Komunuma Popola Konsilantaro en Elĥovo rakontis pri la historio de tiu regiono, pri la problemoj kaj sukcesoj de la laboruloj, pri la patriotismo de la loka loĝantaro.

La prezidantino de la Virina Komisiono ĉe BEA Belka Beleva dankis al la dommastrinoj pro la kortuŝa akcepto kaj rakontis pri la agado de la bulgaraj esperantistinoj, kiuj estas samtempe patrinoj, edzinoj, dommastrinoj, laborulinoj kaj sociagantinoj.

La sekretario de DE de BEA en Plovdiv Fani Mihajlova kenceze konigis al la virinoj el Elĥovo la historion de Esperanto, ĝiajn ideojn kaj perspektivojn.

Ivanka Radkova informis la kunvenintojn pri la respondeca agado de la esperantistinoj-veteraninoj, multaj el kiuj fordonis sian vivon por la libero de nia patrujo. Aparte menciindas la sindona kaj longjara aktivo de la honora prezidantino de Virina Komisiono kaj unu el ĝiaj fondintoj Trajana Petkova — heroo de socialisma laboro.

Vasja Cvetkova, sekretario de la Virina Komisiono ĉe BEA kaj de MEM, rakontis pri la esperantista pacmovado, pri ĝiaj celoj kaj sukcesoj.

La delegitinoj kun intereso trarigardis la urban etnografian muzeon, vizitis la domon de modo „Janica“.

La esperantistoj el Jambol agrable surprizis la partoprenantinojn per festa koncerto, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto. Penka Papazova emocie deklamis en Esperanto siajn jubileajn versojn. Estis plenumita ankaŭ muzikprogramo.

La 17-an de majo matene en la Junulara Domo apud rivero Tunĝa okazis la konferenco. Antaŭ ĝia komencigo la partoprenantinoj kun intereso trarigardis la ekspozicion de gobelinoj, aranĝitan de Minka Angelova, esperantistino el Jambol. Kaptis la atenton ankaŭ ekspozicio de ilustritaj bildkartoj el la tuta mondo, prezentita de Zora Oŝanska kaj Vanja Litova.

Per unuminuta silento la ĉeestantinoj omaĝis la memoron de la forpasintaj E-aktivulinoj Katja Maneva — pentristino, kaj Ljuba Bojaĝieva — E-poetino.

En sia festparolado Belka Beleva traktis ĉiujn pasintjarajn aktivecojn de la bulgaraj esperantistinoj. Kun fiero ŝi emfazis, ke la sukcesoj de la Virina Komisiono estas fakte sukcesoj de ĉiuj esperantistinoj-aktivulinoj el la lokaj landaj societoj. En diversaj distriktoj la agadmanieroj estas malsamaj. Estiminda estas la utila agado de E-instruistinoj, pri kiuj ŝi diris: „Mi genufleksas antaŭ ilia ekskluzive granda laboro, kiun mi komparas kun la laboro de niaj renesancaj instruistoj“. Daŭras plu la esploroj pri la agado de la bulgaraj E-veteraninoj. Multaj el niaj distriktaj aktivulinoj jam sendis por la arkivo de Virina Komisiono interesajn informojn, kiuj pliriĉigos la histo-

rion de la bulgara virina E-movado. Multaj el la esperantistinoj havas konstantan kontakton kun la amas-organizaĵoj — la Movado de Bulgaraj Virinoj, Patrolanda Fronto, Pacdefenda Komitato ktp., dank' al kio estis realigitaj komunaj iniciatoj. La Virina Komisiono mem bone kunlaboras kun la Komitato de la Movado de Bulgaraj Virinoj, kiu disponigas al ni propagandajn materialojn (kelkfoje oni publikigis artikolojn en la komitata bulteno pri Esperanto kaj bulgaraj esperantistinoj), eldonas ankaŭ en Esperanto la luksan revuon „Bulgario“. Pro sia bonega kaj multfaceta agado la

Virina Komisiono ricevis internacian agnoskon fare de KVA (Komisiono pri Virina Agado) ĉe UEA dum la 71-a UK en Pekino. Multaj aktivulinoj partoprenis diversajn iniciatojn, marŝojn, renkontiĝojn kaj kunvenojn, dediĉitajn al la paco, kolektis pacsubskribojn. Ne eblas menci iujn faritaĵojn de la senlaciaj bulgaraj esperantistinoj, ilian vere apostolan laboron.

Al novaj sukcesoj ĝis la venontjara virina E-konferenco en Târgoviște!

V. ANTONOVA

Literaturaj tagoj „Penjo Penev“

Esperanto estas bonega rimedo por montri nian valoran poezion al la mondo kaj tiun ĉi rimedon ni aktive kaj racie uzas. Multaj poemaroj aperis esperantlingve, multaj bulgaraj poetoj estis digne prezentitaj al la eksterlandaj Esperanto-legantoj. En Esperanto aperis poemaroj de Botev, Smirnenki, Vapcarov, kaj pasintjare apud ili vicigis la poemaro de Penjo Penev „Homoj, antaŭen!“ Tiu ĉi ne tre ampleksa poemkolekto vekis la atenton de la bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj. La bulgara junularo ege ŝatas la poemojn de Penjo Penev kaj ne estas strange, ke „Homoj, antaŭen!“ elĉerpigis nur dum tri monatoj, malgraŭ ke ĝi aperis en 2000 ekzempleroj. Elokventa pruvo pri la granda intereso al la poezio de Penjo Penev estis la „Esperantaj literaturaj tagoj „Penjo Penev“, kiuj ĉi-jare okazis por la unua fojo, la 9-an de majo 1987, en urbo Dimitrograd.

La dommastroj de tiu ĉi literatura festo, organizita de Bulgara Esperantista Asocio, estis la Distrikta Estraro de BEA — Haskovo, kaj Esperanto-Societo „Georgi Dimitrov“ en Dimitrograd. Enkadre de la literaturaj tagoj okazis konkurso-recitalo el la poezio de Penjo Penev, en kiu partoprenis gejunuloj-esperantistoj el 8 urboj kaj ĉeestis gastoj el 10 urboj.

La literaturajn tagojn „Penjo Penev“ oficiale inaŭguris Violin Oljanov, membro de la Buroo de BEA kaj ĉefredaktoro de revuo „Paco“. La partoprenantojn varme kaj kore salutis Nedjalka Dimova — vicprezidantino de la Komunuma Popola Soveto kaj prezidantino de la Komunuma Soveto pri Spirita Evoluo.

La tasko de la ĵurio estis malfacila, ĉar preskaŭ ĉiuj partoprenantoj en la konkurso-recitalo montris, ke ili ne nur amas la ardan entuziasman poezion de Penjo Penev, sed ankaŭ scipovas emocie interpreti ĝin en Esperanton.

Post la konkurso-recitalo la partoprenantoj florornamis la monumentojn de Georgi Dimitrov, de d-ro Lazaro Zamenhof kaj de Penjo Penev.

La partopreno en tiu ĉi literatura festo kaŭzis neforgeseblan emocian travivaĵon. Estis granda ĝojo aŭskulti recitalon de la konataj poemoj de Penjo Penev en Esperanto. Impresis la bona kaj preciza organizado flanke de la dommastroj en la personeco de Nikola Pilev — prezidanto de DE de BEA en Haskovo, de Tončo Kumanov — prezidanto de Esperanto-societo „G. Dimitrov“ en Dimitrograd, de la esperantistoj Ivan Dobrikov, Stanka Sivrjiska, Jeljo Delev, Janka Koleva kaj aliaj.

La tuta atmosfero de la literaturaj tagoj „Penjo Penev“ montris, ke tiu ĉi aranĝo ne estis altrudita de CE de BEA, sed la partoprenantoj en ĝi, la junaj esperantistoj, deziris kaj bezonis ĝin. Tiu ĉi grava fakto pensigas nin pri la estonto de tiuj literaturaj tagoj. Ĉu ili estigu tradiciaj, ĉu el tagoj dediĉitaj al la poezio de Penjo Penev, ili transformiĝu en tagojn, dediĉitajn al la nuntempa bulgara socialisma poezio, kiu ankoraŭ ne estas laŭmerite reprezentita en Esperanto-tradukoj? Ĉu Dimitrograd, ĉiun duan jaron, en majo, povus esti la gastiganto de iaspeca forumo de la originala kaj tradukita Esperanta literatura kreado en Bulgario? Tiam dum la literaturaj tagoj estus eble organizi ne nur konkurson-recitalon, sed ankaŭ konkurson pri la plej bona originala aŭ tradukita libro en Esperanto, aperinta en nia lando. Aŭ premii la plej bonan Esperanto-aŭtoron aŭ Esperanto-tradukiston en Bulgario — dum ĉiu dujara periodo. La estonto plej bone montros la sorton de tiu ĉi promesplena Esperanta literatura aranĝo. Gravas ke la ĉi-jaraj Esperantaj literaturaj tagoj „Penjo Penev“ estis sukcesaj kaj fruktodonaj.

Georgi MIHALKOV

PRI LA PROPRA NOMO DE ZAMENHOFA PLANLINGVO

(Daŭrigo de n-ro 6/1987)

La foto-represo de la Unua Libro (1948) aperis nur en 500 ekzempleroj (malgranda eldonkvanto). Tiun aĉetis plejparte libroŝatantoj, sed ankaŭ historiistoj pri Esperantaj movado kaj literaturo. Kaj tamen la libro estis aĉetebla en daŭro de 20 jaroj. Do la intereso al ĝi ne estis tiom granda inter la aĉetantoj de Esperantaj libroj.

Baldaŭ aperis inform-libroj de D-ro Ivo Lapenna, (1909), kiuj enhavis la kvaran (renversitan) nomon de Zamenhofa planlingvo eĉ en sia titolo: „La Internacia Lingvo. Faktoj pri Esperanto“ (1-a eldono, Londono, 1954) kaj „Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo“ (2-a eldono, 1972). Sub la ĉefredaktoreco de la sama verkisto aperis la plej impona ĝis nun verko: „Esperanto en Perspektivo. Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo“, UEA, 1974. Kvankam en tiu etapo de ŝanĝoj pri la nomo de Zamenhofa planlingvo temis fakte nur pri substituo de unu el la funkciaj nomoj (Lingvo Internacia) per la nova (kvara laŭ kronologia vico, renversita) — la nomo Internacia Lingvo (enkondukita de Sirjaev en 1933 kaj de D-ro Setälä en 1948), tamen oni ne nur toleris, sed oni vaste uzadis kiel antaŭe) la plej konatan nomon pri Zamenhofa planlingvo — la nomon Esperanto. Iom poste la reformemuloj atakos ankaŭ tiun nomon.

Ne en sia titolo, sed en siaj tekstoj la „Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro“ (1960, sub redaktoreco de D-ro Lapenna) konfirmis la konstatojn pri „preferata“ uzado de la renversita nomo Internacia Lingvo anstataŭ la uzon de la malnova (de D-ro Zamenhof enkondukita) nomo Lingvo Internacia. Tamen tiu venko de la renversita nomo Internacia Lingvo estas nur ŝajno, ĉar en la artikoloj (presitaj en la menciita „Memorlibro“): a) de D-ro Eugeno A. Bokarev (1904-1971) estas speciale akcentita la malnova nomo Lingvo Internacia kaj nur ĝi estas uzita dekon da fojoj³² tra la tuta artikolo; b) de John Francis (1924), skoto, kiu citas la Unuan Libron laŭ Zamenhofa maniero: „Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro“³³ kaj c) Gaston Waringhien (1904) ankaŭ uzas la nomon Lingvo Internacia por indiki la Unuan Libron³⁴, sed D-ro Lapenna uzas la renverson de tiu nomo — Internacia Lingvo³⁵.

Kune kun la renverso de unu el la nomoj (Lingvo Internacia) de la Zamenhofa planlingvo la reformemuloj komencis revizii la tradukojn de D-ro Zamenhof, kaj tio jam estas rompo en niaj lingvoj kaj literaturo. En paĝo 2-a de la Unua Libro D-ro Zamenhof aperigis tre instruan aforismon pri Lingvo Internacia kaj la lingvoj naciaj. Tiun flugilhavan frazon D-ro Zamenhof tradukis kaj ĝi estis citata diversloke en daŭro de 60 jaroj sen ŝanĝo, sen modifo. Tamen en 1948 aperis (dua) versio kaj en 1960 — eĉ tria versio. La leganto mem povas fari komparon por konstati kaj renverson de la unua nomo (Lingvo Internacia) pri Zamenhofa planlingvo al ties kvara nomo (Internacia Lingvo) kaj pri kelkaj aliaj (ŝanĝ(et)oj) kaj modifoj. Jen estas la tradukoj mem — Zamenhofa (N-ro 1) kaj tiuj de reformemuloj (N-roj 2—3):

1) „Lingvo Internacia“, kiel ĉiu nacia, estas **komuna** propraĵo; la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn

personajn rajtojn al ĝi.“ (D-ro Zamenhof, A. Zakrzewski, D-ro Dietterle)³⁶.

2) „Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo **socia**; kaj la aŭtoro por ĉiam **forcedas** ĉiujn personajn rajtojn je ĝi.“ (D-ro Setälä, 1948; Ludovikito, 1973³⁷).

3) La internacia lingvo, same kiel ĉiu nacia, estas **socia**; propraĵo; La aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi.“ (en „Memorlibro...“³⁸) (Ĉiuj substrekaj miaj — C.M.).

La traduko sub N-ro 1 estas (pli konciza kaj) pli preciza laŭ senco ol tiuj sub N-roj 2 kaj 3. La esprimo „komuna propraĵo“ estas pli trafa ol la esprimo „propraĵo socia“ (en N-ro 2) kaj „socia propraĵo“ (en N-ro 3). La rusa vorto „obščestvenn-ij, -aja, -oe“ posedas kvar fundamentajn signifojn. D-ro Zamenhof elektis la trian signifon, kiu estas la plej trafa en tiu ĉi kazo³⁹. En sia verkaro, parolante pri Esperanto, D-ro Zamenhof ofte uzas la radikojn „komun-“, ekzemple en kunmetaĵo „komune-homa lingvo“.

Do la reformemuloj atakis ne nur la (kronologie) unuan nomon de Zamenhofa planlingvo — Lingvo Internacia, sed ankaŭ agredis kontraŭ tekstoj, tradukitaj de D-ro Zamenhof, por konformigi tiujn tekstojn al la proponata de ili nomo Internacia Lingvo. Nun la esperantistaro disponas pri tri versioj de la aforismo sur paĝo 2-a en la Unua Libro. Feliĉe la du „novaj“ tradukoj estas sub la kontentiga nivelo. Ankaŭ la proponata nomo Internacia Lingvo estas sub tiu nivelo, ĉar sur kaj super la kontentiga nivelo la lokoj estas okupitaj de la nomoj Esperanto, Lingvo Internacia kaj Lingvo Internacia „Esperanto“.

Laŭ la statuto de ĵus fondita Akademio Internacia de Sciencoj (AIS) en la ŝtato San-Marino (fine de 1985) la ĉefa laborlingvo estas la Zamenhofa planlingvo, sed bedaŭrinde sub sia (kronologie) kvara (la superflua) nomo⁴⁰, altrudita ekde 1933-1948. Kvankam la superflua nomo Internacia Lingvo estis plejparte enkondukita post la Dua Mondmilito, ĝi ne estis facile rimarkebla kaj ekstere ne estis tiom danĝera, ĉar dum la unua stadio (1933-1948-1985)) ĝi ne pretendis esti nur la unusola nomo de la Zamenhofa planlingvo. Tiam la nomo Internacia Lingvo toleris la faktan nomon Esperanto. Ĝi aroge pretendis precipe por la modesta loko digne okupita de la nomo Lingvo Internacia. En tiu sia klopodo (dank' al protekto de aŭtoroj kaj des pli de redaktoroj) la nova nomo Internacia Lingvo konkurenca kontraŭ la malnova nomo Lingvo Internacia. Nun ili ambaŭ estas uzataj en la malvasta teritorio, aparteninta pli frue nur al Lingvo Internacia. Kaj la teritorio de la nomo Esperanto ankaŭ iom suferis pro sporadaj invadoj de la superflua nomo Internacia Lingvo.

Tamen la entreprenita atako de prof. Helmar Frank el Paderborn, FRG, celas per la statuto de AIS pereigi ne nur la nomon Lingvo Internacia, sed ankaŭ la nomon Esperanto kaj ties kombinon — (la ampleksa nomo) Lingvo Internacia „Esperanto“.

Kie eraras prof. Frank? Li opinias, ke la Zamenhofa planlingvo havas du nomojn — „malnova nomo“

(Internacia Lingvo) kaj „nova“ (Esperanto). Tiu lasta nomo delonge kaj nun dominas en uzado inter la esperantistoj kaj en la literaturo. Tamen pro propra sperto el kontaktoj dum varbado prof. Frank konstatis, ke la „nova“ nomo Esperanto malplaĉas al la sciencaj rondoj, tial li starigis tezon pri komplete forigo de la nomo Esperanto kaj pri restarigo de la „malnova“ nomo Internacia Lingvo, kiu devas resti la unusola nomo de la Zamenhofa planlingvo. Tiu „solvo“ de la problemo fare de prof. Frank sin apogas aŭ sur falsajo, aŭ sur malrealajo, arbitre starigita de li mem. Eĉ modesta analizo de la faktoj pri apero de la nomo (kaj ties sinonimoj) pri la Zamenhofa planlingvo indikas, ke tiu nomo (kaj ties sinonimoj) aperis samtempe en la ekfunkcianta lingvo (1887—1889).

La legantoj de la Unua Libro (en rusa, pola, franca kaj germana lingvoj) en 1887 unue ekkonis la nomon de la aŭtoro — D-ro Esperanto. Kaj ili interparolis kaj/aŭ korespondis pri „la Lingvo de D-ro Esperanto“, tiu (pseŭdo) nomo tuj glitis al nomo de Zamenhofa planlingvo: D-ro Esperanto kaj lingvo de D-ro Esperanto.

Fine de la sama jaro (1887) D-ro Esperanto verkis en sia lingvo la „Duan Libron de la Lingvo Internacia“. El tiu titolo ni ekscias, ke D-ro Zamenhof baptis sian kreaĵon Lingvo Internacia. La unuaj adeptoj de tiu lingvo povis diri: Lingvo Internacia de D-ro Esperanto aŭ nur Lingvo Internacia. La nomo Lingvo Internacia aperis ankaŭ en la titolo de tria libro, konata kiel „Aldono al la Dua Libro de la Lingvo Internacia“. Ne nur tio. En la „Aldono“ D-ro Zamenhof tradukis oficiale la kompletan titolon de la Unua Libro laŭ jena maniero: „Lingvo Internacia“. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro“. En la tekstoj kaj de la Dua Libro kaj de la „Aldono“ al ĝi D-ro Zamenhof nomis sian lingvan inventaĵon Lingvo Internacia. En tiu fora komenca epoko la esperantistaro ekuzis la nomon Lingvo Internacia aŭ/kaj Lingvo de D-ro Esperanto aŭ koncize (la Lingvo de) Esperanto. La esprimo (nocio) Lingvo Internacia fariĝis propra nomo pri nekutima fenomeno, sed al ĉiu tiu nomo ŝajnis „amorfa“. Por ĝin konkretigi aperis la esprimo (nocio) „Lingvo Internacia „Esperanto“. Tiel en mallonga periodo (de julio 1887 ĝis aŭgusto 1889) aperis la tri nomoj de la Zamenhofa planlingvo: Esperanto, Lingvo Internacia kaj Lingvo Internacia „Esperanto“. Do la efektive malnovaj nomo kaj sinonimoj de la Zamenhofa planlingvo estas tri. La kvara nomo — Internacia Lingvo, estas nova (1933—1948), sed absolute superflua, ĉar ĝi aperas kiel versio de la jam longe ekzistanta nomo Lingvo Internacia.

Nun ni revenu al la konsideroj de prof. Frank. Mi esperas, ke se prof. Frank konis tiujn faktojn, li certe solvus la problemon elektante la vere malnovan nomon Lingvo Internacia. Tiam ne ekzistus tiom abrupta rompo. Tamen eĉ tio ne kontentigos la esperantistaron, kiu jam tutan jarcenton (1887—1987) havis okazon spontane manifesti sian preferon al la nomoj (kaj sinonimoj) Esperanto kaj/aŭ Lingvo Internacia „Esperanto“ — ambaŭ oficiale sankciitaj en la „Fundamento de Esperanto“ (1905). En nia informo-varba agado neniu rajtas logi la publikon. Frue aŭ malfrue la varbitoj komprenos, ke temas pri Esperanto.

Krome, neniu rajtas timi la nomon Esperanto, ĉar tiu unue estis pseŭdonomo de D-ro Zamenhof. Estas vero, ke „esperanto“ (minuskle) signifas „homo, kiu

esperas“, sed frazo ne povas fariĝi propra nomo, tial „D-ro Esperanto“ signifas „D-ro Optimisto“. Do Esperanto signifas Lingvo de Optimisto, Lingvo de Optimismo, Lingvo de Optimistoj.

Evidente la Senato de Akademio Internacia de la Sciencoj en San-Marino devas korekti sian eraron en la statuto de tiu Akademio, substituante la nomon Internacia Lingvo per la nomo Lingvo Internacia Esperanto aŭ minimume per la nomoj Lingvo Internacia (Esperanto).

Ke tiu korekto estas necesa, pri tio ne devas ekzisti dubo. Prof. Frank faris eraron dank' al sia misa supozo, ke la nomo Internacia Lingvo estas malnova, dekomenca, jam tradicia, de D-ro Zamenhof (mem) starigita. Evidente tiu aserto estas senbaza. Prof. Frank, kiel preskaŭ ĉiuj ni, ne rimarkas la diferencon inter la nomoj Lingvo Internacia kaj Internacia Lingvo. Dum longa tempo la esperantistaro manifestis superfluan toleremon al la nomo de sia lingvo. La problemo pri la nomo de Zamenhofa planlingvo aperis subite, apenaŭ kiam la statuto de AIS en San-Marino ŝanĝis la nomon de Zamenhofa planlingvo (1985) sub la unusola nomo — Internacia Lingvo. Sed la fakto, ke la propra nomo de AIS en San-Marino estis kunmetita laŭ la sama maniero kiel la nomo de Zamenhofa planlingvo en la konsiderenda „Fundamento de Esperanto“ (1905) firme indikas, ke al prof. Frank, rektoro de AIS en San-Marino, kaj al la Senato de tiu Akademio ne mankis konoj kaj metodo por perfekta solvo de la problemo pri la nomo de la Akademio mem. Jen estas paralelo de tiuj nomoj:

1) Akademio Internacia de la Sciencoj en San-Marino;

2) Lingvo Internacia (de D-ro) Esperanto.

La nomo de AIS kongruas laŭ sia strukturo al la nomo de la Zamenhofa planlingvo en „Fundamento de Esperanto“ (1905). Bedaŭrinde la statuto de AIS en San-Marino rompis la „Fundamenton de Esperanto“ (1905), „oficialigante“ novan (?) nemon por la Zamenhofa planlingvo — Internacia Lingvo, sub preteksto, ke tiu nomo estas konvena, laŭleĝa. Se oni vere bezonas kvalifiki tiun nomon (Internacia Lingvo) — oni devas diri, ke ĝi estas falsa, nezamenhofa, netradicia. Ĝi mankas en la „Fundamento de Esperanto“ (1905). Kvankam por la Zamenhofa planlingvo ekzistas ekde la komenco (1887—1889) tri nomoj (Esperanto, Lingvo Internacia, Lingvo Internacia „Esperanto“), AIS enkondukis kvaran nomon kaj ekskludas la uzadon de ĉiuj tri malnovaj nomoj. Tio estas grava eraro — des pli ĉar temas pri rompo kontraŭ la Fundamento de Esperanto (1905).

La Esperanto-movado venke travivis krizojn (1894, 1897), skismon (1907) kaj du mondmilitojn (1914—1918, 1939—1945) kaj mi estas optimisto pri la fino de nun komenciĝinta akra disputo: venkos la interna tradicio de lingvouzo.

Canko MURGIN

Noto de la redakcio: En n-roj 5, 6 kaj 8/1987 de „BE“ estas publikigita la artikolo de Canko Murgin „Pri la propra nomo de Zamenhofa planlingvo“. La notoj al la artikolo aperos en n-ro 9 1987.



Renkontiĝo

Antaŭ dek jaroj mi partoprenis la „Oran aŭtunon“ en Pollando. Inter la multaj esperantistoj el diversaj landoj tie estis homo apoganta sin sur du bastonoj. Li havis blankan hararon, sed lia vizaĝo aspektis ne tro maljuna.

Tiel okazis, ke li preskaŭ ĉiutage sidis apud mi ĉe la manĝotablo. Tute nature estis, ke ni interparolis. Ordinare mi lin akompanis posttagmeze dum liaj promenadoj en la proksima ĝardeno. Tie ni sidigis sur benko, por ke li ripozu kaj tiam li komencis paroli:

— Mi jam diris al vi, ke mi venis ĉi-tien pro li. . . per lin renkonti.

— Jes, — mi respondis, ĉar mi jam sciis tion.

— Sed kiam li venos? Li skribis al mi, ke li tuj venos, sed eble okazis io, kio malhelpis al li.

— Certe, — mi respondis.

— Ĉu vi scias kiom da jaroj pasis? Pli ol tridek. Tiam mi estis dudekdujara. Sed dum tiu tempo mi lin ne forgesis kaj la deziro vidi lin plifortigis. Per tuta mia estaĵo mi volis renkonti lin. Kaj jen, li skribis al mi, ke ĉi-aŭtune li estos tie ĉi. Mi ne povis plu atendi, mi prenis miajn bastonojn kaj venis por vidi lin. Sed kial li ne venas?

— Eble li venos.

— Mi jam diris al vi, ke li estas ruso, kaj mi renkontis lin dum la milito. Ne, ne, mi ne renkontis lin, li trovis min en la arbaro. Nia armeo jam retiriĝis post la grandega, terura batalo apud Stalingrado, sed ni daŭrigis batali. Estis neordinare frosta, neĝa vintro. Mi falis vundita, perdinte la konscion. Sed mi tute ne povas kompreni kiel mi rekonsciigis kaj malfermis miajn okulojn. Tiam mi vidis junulon kliniĝintan al mia brusto kaj aŭdis esperante: „Dio mia, li estas esperantisto!“ Vere, ĉiam mi portis esperantan steleton sur la maldekstra poŝeto de mia uniforma jaketo. Kaj plu mi memoris nenion. Kiam mi denove malfermis la okulojn, mi vidis ke min rigardas du blujaj okuloj de neordinare bela knabino. Poste de la juna esperantisto, Volodja, mi eksciis, ke post la batalo sanigistoj prenis la vunditojn de la batalkampo kaj alportis ilin en sanigeojn. Sed eble ĉar mi estis falinta en la arbaro kaj estis sen konscio, mi ne respondis al iliaj alvokoj kaj ili ne trovis min. Aŭ eble la sorto volis, ke mi renkontu la plej karajn estaĵojn en mia vivo — Volodja kaj lian fratinon Raisa.

Mi ofte pensis: kio estas homo? Kaj kial lia koro pleniĝas de neordinare bela sento, de

ĝojo, muziko, vidante iun estaĵon por unua fojo. Tiel okazis kun mi, kiam mi vidis Raisan.

Estis milito, mi estis en neordinaraj cirkonstancoj, sed mi ekamis! Kaj tiu neordinare belega amo restis kiel lumo dum la tuta mia vivo. . .

Li eksilentis. Mi ankaŭ silentis antaŭ tiu granda amo, portata en la koro de tiu homo. Post kelkaj minutoj li denove ekparolis:

— Volodja trovis min, ĉar li, kun kelkaj kamaradoj, estis irinta al proksima arbaro — ili kolektis lignaĵon por varmigi la ejon, kie kunvenis la junaj volontuloj. Mi nomas ilin tiel, ĉar vere, mi ne sciis ĝuste kian funkcion ili plenumis.

Volodja estis deksepjara knabo. En la lernejo li ellernis bone Esperanton. Lia belega fratino, Raisa, unu jaron pli aĝa ol li, lernis en lernejo por hospitalaj flegistinoj kaj venis en la grupon de volontuloj por esti utila al ili.

Volodja diris al mi, ke en la vilaĝeto komencis reveni la vilaĝanoj: virinoj, infanoj, maljunaj viroj. Inter la revenintoj estis Raisa kaj la avino de Volodja. Si estis vera popola kuraĉistino, sed bedaŭrinde malsana.

Raisa, per siaj scioj kaj helpate de la instrukcioj de sia avino, min kuracis.

Ĉu vi kredas, mi suferis pro miaj vundoj en la brusto kaj la kruroj, sed samtempe mi estis feliĉa, kiam la delikataj fingroj de Raisa min sanigis.

Si ne sciis Esperanton, sed por mi estis sufiĉe, ke ŝi sidis apud mi. Ĉu vi povas imagi, ke estis horoj, kiam mi benis miajn vundojn?

Volodja estis bonega knabo. Li rapide komprenis mian senton al lia fratino kaj ne nur tradukis miajn tenerajn vortojn, per kiuj mi dankis al ŝi, sed insistis, ke ŝi lernu Esperanton. Si ridetis per sia malgaja rideto. Tiu, kiun ŝi amis, estis sur la fronto. . . Ĉu li restos viva? Tiam mi suferis, tre multe suferis. . . Kiu povas mortigi lin? Ni, germanoj! Kaj kial? Milito! Sed al kiu estis necesa tiu milito? Mi hontis, mi suferis rigardante tiujn bonkorajn homojn, kiuj sanigis min. Foje mi diris tion al Volodja kaj li respondis: „Ne maltrankviliĝu, Walter, vi ne estas kulpa pri la milito. . . Vi estas devigita. . . plenumi la ordonojn, mi scias tion. Sed ni estas homoj en sia esenco kaj, krome, ni estas esperantistoj. Kaj la bazo de tiu belega internacia lingvo estas amikeco, frateco, paco inter la homoj.“ Kaj tiam li rakontis al mi, ke kiam lia kamarado malfermis



Gorov, Hristo: „Mia verda pado“. Eseo kaj rakontoj. Redaktis: Georgi Mihajkov. Kovrilo kaj titolpaĝo: Maja Gorova. Eldonis: BEA, 1986. Paĝoj: 183. Prezo: 0,90 lv.

Antaŭnelonge la eldonejo de BEA ĝojigis la legantojn-esperantistojn per nova libro — „Mia verda pado“ de Hristo Gorov. La libro estis delonge atendata, ĉar la monda esperantistaro bone konas la nomon de Hristo Gorov.

La libro enhavas elektitajn rakontojn kaj eseojn, kiuj ankoraŭfoje atestas pri la talento de tiu ĉi verkisto. Gorov estas drameca aŭtoro. Li ne nur detale kaj atente observas siajn heroojn, sed strebas montri ilin en streĉaj situacioj. Li ne priskribas, ne

LA VERDA PADO DE LA VERKISTO

klarigas la agojn de la herooj, sed lasas ilin mem agi. Ekzemple, en la rakonto „Vipuro“ la konflikto inter Klimen Rankov — la regionestro, kaj lia filo Anton disvolviĝas antaŭ la okuloj de la legantoj kaj en tiu ĉi konflikto montriĝas la karakteroj de la du ĉeffiguroj, iliaj antagonismaj politikaj konceptoj. Nature kaj realisme Gorov montras la idean forton de la komunisto Anton. Same en la rakonto „Fratoj“ la aŭtoro talente priskribas la idean evoluon de Kotev, kiu mem komprenas la veron kaj firme ekstaras ĉe la flanko de la batalanta popolo. Tamen Gorov estas ankaŭ subtila psikologo. Li scipovas penetri en la psikologion de siaj herooj, kiel ekzemple en la rakonto „La pendiginto“, en kiu la ĉeffiguro Aleko travivas fortan internan konflikton.

Kiam ni parolas pri la proza verkaro de Gorov, ni nepre devas emfazi, ke ĉiuj liaj rakontoj kaj eseoj estas forte ligitaj al la Internacia Lingvo. Esperanto ne estas nur ekzotika fono de la verkaro de Go-

rov. Siajn rakontojn kaj eseojn la aŭtoro verkas el la pozicio de esperantisto, kiu konscias, ke la fundamenta celo de Esperanto estas la internaciismo, la interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj.

La eseoj estas dediĉitaj ĉefe al esperantistoj, kiuj oferis sian junan vivon por pli bona kaj justa mondo. Emocie kaj kortuŝe Gorov rakontas pri siaj amikoj esperantistoj kaj antifaŝistoj kiel Ivan Armin, Elio Miĥajlov, Diĉo Petrov k.a.

„Mia verda pado“ klare montras, ke Gorov estas ne nur talenta verkisto, sed antaŭ ĉio arda esperantisto, kiu dum sia tuta vivo senlace laboras por Esperanto.

La libro estas belega omaĝo al la centjara jubileo de Esperanto. Per ĝi BEA donas sian kontribuon al la trezorejo de la monda Esperanto-literaturo. „Mia verda pado“ estas elokventa atesto ne nur pri unu honesta vivo, sed montras ankaŭ unu el la plej gloriaj momentoj en la historio de Esperanto-movado en Bulgario.

G. ILIEV

mian uniforman mantelon, pensante, ke mi estas morta, Volodja, vidante Esperantan insignon sur mia brusto, tuj metis sian oreon sur mia koro, por vidi ĉu ĝi pulsas. Kaj li diris al mi, ke kiam li aŭdis ĝian tute mallaŭtan pulsadon, li neordinare ekĝojis. Tiam li kaj liaj kamaradoj alportis min en ilian subteran ejon.

Kiam mi devis disiĝi de miaj savintoj, por ke mi estu transportita en malsanulejon, Volodja brakumis min kiel vera frato. Tiam mi donis al li mian verdan Esperantan steleton, por ke ni estu amikoj, fratoj por ĉiam.

Raisa, rigardante min per siaj belegaj, malgajaj okuloj, diris esperante: „Ne forgesu nin!“ „Neniam, neniam!“ — mi ekkriis kaj larmoj plenigis miajn okulojn. . . ĉar eble neniam mi ŝin vidos. . .

Pasis jaroj. . . Mi serĉis Volodja per leteroj, kaj fine trovis lin. Mi ne kuraĝis demandi pri

Raisa, sed li, sciante, ke mi atendas sciigon pri ŝi, skribis al mi, ke tuj post mia foriro, ŝi kun kelkaj aliaj junulinoj iris al la fronto kiel flegistino, eble volante esti pli proksime al tiu, kiun ŝi amis. . . Sed, bedaŭrinde, ŝi pereis en Hungario.“

Samideano Walter eksilentis, spirante profunde. Mi sentis, ke mi devas nur silenti antaŭ lia granda amo kaj doloro. . .

Dum la nokto mi multe pensis. Jes, vere ekzistas amo, kiu povas resti en la homa koro dum la tuta vivo. . .

La sekvan tagon venis malgranda grupo el Sovetunio. Mi estis profunde kortuŝita, vidante la bastonojn de samideano Walter sur la tero kaj lin, — en la ĉirkaŭpreno de alta, belstatura homo. Mi komprenis — li estis la atendata Volodja.

Nevena NEDELČEVA

(La rakonto estas distingita per III premio en la Literatura Konkurso de „BE“).

NI KONSTRUU PACAN MONDON!

Antaŭ nelonge Inga-Lill Tyrefelt vizitis Bulgarijon kiel gvidantino de grupo da svedaj infanoj. En n-ro 6/87 de „BE“ ni rakontis al nia legantaro pri ilia gastado en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica. Ĉi-sube ni proponas al vi nian intervjuon kun Inga-Lill Tyrefelt.

— Kial vi decidis lerni Esperanton?

— Mi ankoraŭ ne posedas tiun lingvon, sed mi faros ĉien por rapide ellerni kaj poste instrui ĝin. Esperanto estas ekonomie, socie kaj politike neŭtrala. Mi trovas ĝin tre facila, kun genia konstruo. La Lingvo Internacia malfermas la vojon al amikeco, komprenigo kaj paco inter la popoloj.

— Bonvolu rakonti pri la lernejana grupo „Paco“, kiun vi gvidas, kaj pri la pacmovado en Svedio.

— Lige kun la 40-jara jubileo de UN mi organizis en Gotenborgo konferencon sub devizo „Kune por pli bona mondo“. Mi laboris pri la problemoj de tiu konferenco pli ol unu jaron. Miaj gelernantoj ankaŭ entuziasmiĝis kaj tiel estis fondita la grupo „Paco“. Ĝi

konsistas el gelernantoj de mia lernejo. Ili volas labori por monda paco kaj protestas kontraŭ ĉiu speco de perforto kontraŭ individuoj, bestoj kaj naturo. Ili provis helpi al la infanoj en Bejruto kaj Shatila en Libano per kolektado de mono, kiun ni sendis tien, kaj per skribado al lernejoj kaj eklezioj. La membroj de „Paco“ opinias, ke la junularo devas konscii sian grandegan forton kaj devas uzi ĝin por konservado de la monda paco. Ni intencas diskonigi kune kun niaj bulgaraj amikoj porpacan alvokon al la junaj homoj en la mondo.

La pacmovado en Svedio aparte kreskas post la murdo de nia ĉefministro Olaf Palme. Tio provokis kolektivajn vekigojn. Ĉiam pli multaj homoj komprenas la neceson pri forigo de ĉiuj iloj por perforto kaj milito. Fondiĝis profesiaj grupoj de kuracistoj, de instruistoj ktp, kiuj komencis labori kontraŭ la nukleaj armiloj, por paco. Mi apartenas al la estraro de la Internacia Virina Asocio por Paco kaj Libereco.

— Vi intencas realigi en Svedio televidajn elsendojn en Esperanto, ĉu vere?

— Jes, mi provos, ĉar tio kontribuos por disvastiĝo de Esperanto en mia lando.

Konklude mi volus diri, ke ni bezonas pacon por vivi kaj konstrui mondon de reciproka fido kaj interkomprenigo.

Intervjuis: Petrana MILANOVA

Jubileaj celebradoj



Partoprenintoj en FIER — Plovdiv, majo 1987

ARANĜOJ EN PLOVDIV

Por soleni la 100-jariĝon de la Internacia Lingvo, la esperantistoj el Plovdiv okazigis du gravajn aranĝojn en majo ĉi-jare.

En la ekspozicia salono de la Kulturdomo de Sanlaboristoj estis aranĝita ekspozicio „100 jarojn Esperanto“. Ĝian malfermon la 5-an de majo ĉeestis esperantistoj, amikoj de Esperanto, ĵurnalistoj, la direktoro de la Kulturdomo ktp. Dum 10 tagoj la ekspozicion vizitis ĉirkaŭ 600 personoj, kiuj pere de la ekspoziciitaj dokumentoj, fotoj, libroj, gazetoj, klarigaj tekstoj informiĝis pri la lingvo Esperanto kaj pri la E-movado tra la mondo, en nia lando kaj en Plovdiv. Nia tuttaga deĵorantino pretis doni pliajn informojn al ĉiu interesiĝanto.

Menciindas la fakto, ke la ekspoziciejon ni havis je nia dispono senpage, dank' al la bona kunlaborado inter la Kulturdomo de Sanlaboristoj kaj Plovdivaj es-

perantistoj; ĉe la Kulturdomo aktivas De de BEA kaj Klubo de Medicinistoj-Esperantistoj.

La dua aranĝo estis Fiera Internacia Esperantista Renkontiĝo (FIER), okazinta de la 8-a ĝis la 10-a de majo j.k. kaj dediĉita al la jubileo. La ĉi-jaran FIER, dekkvaran laŭvice, partoprenis 136 geesperantistoj el Bulgario, GDR, (ĝemelurbo Leipzig), Ĉeĥoslovakio (ĝemelurbo Brno), Vjetnamio, Hungario. Ili havis eblecon dum la unua tago viziti la ekspozicion pri Esperanto, la plovdivan artgalerion, aŭskulti du prelegojn pri plovdivaj pentristoj (de D. Danev) kaj pri la teatroarto en Plovdiv (de V. Kurteva). Dum la sama tago estis anoncitaj la rezultoj de la tradukkonkurso pri poeziaĵoj de plovdivaj aŭtoroj: unua premio ne estis aljuĝita, la duan gajnis Lilia Sotirova el Plovdiv kaj la trian — Nejko Nejkov el v. Dve Mogili, distrikto de Ruse. La lasta programero de tiu tago estis amika renkontiĝo de la anoj de Arta Klubo (Plovdiv) kaj Literatura Rondo (Sofio).

La kulmino de FIER-programo estis la solena jubilea literatura-muzika koncerto, kiu sekvis tuj post la oficiala malfermo, la 9-an de majo matene. Dum du horoj profesiuloj kaj amatoroj tenis vigla la atenton de la pli ol 150 ĉeestantoj. La Plovdiva Televida Centro sendis skipon por filmi la aranĝon. Okaze de la tago de la Venko super Faŝismo, reprezenta grupo de esperantistoj ornamis per florkrono la Monumenton de la Soveta Soldato sur la Monteto de la Liberigintoj. Posttagmeze restis tempo por viziti la Internacian Foiiron. Dum la dancvespero pri la bona humoro de la ĉeestantoj zorgis la membroj de la junulara E-grupo.

La antaŭtagmezon de la lasta tago la partoprenantoj pasigis en la Malnova Urbo. Ili vizitis historiajn monumentojn kaj eksciis interesajn faktojn pri ili. Nerimarkite pasis la tempo kaj venis la momento de adiaŭo.

En la unuaj tagoj de majo la plovdiva gazeto „Oteĉestven glas“ publikigis kelkajn informojn pri la du jubileaj E-aranĝoj kaj pri la Esperanto-movado en Plovdiv. Aperis intervjuo kun la prezidanto de BEA Hristo Gorov. Ankaŭ Radio Plovdiv informis pri la aranĝoj. Tiu reĝo en la amaskomunikiloj en Plovdiv estas pruvo pri la kreskinta aŭtoritato de nia movado.

Emilia PEJČINOVA

KOLEKTANTOJ JUBILEAS

La 25-26. 4. j. k. en la Internacia Esperanto-kur-sejo — Pisanica, okazis nacia renkontiĝo de kolektantoj sub la slogano „Esperantistoj-kolektantoj — 100 jarojn en servo al la progreso kaj paco“. Kunvenis 35 aktivuloj el Sofio kaj el diversaj aliaj urboj. La riĉenhava prelego de samideano L. Grozdanov vekis grandan intereson, ĉar, krom valoraj faroj de la kolektantoj, en ĝi estis tuŝitaj ankaŭ la gravaj problemoj pri unueco kaj paco. Ĉeestis nian renkontiĝon Hristo Nikolčev — ĝenerala sekretario de la Asocio de Bulgara Filatelistoj, kun kiu ni estas en kunlaboraj rilatoj. Lia valoro raportoj provokis utilan por la kolektantoj diskutadon. Interesan prelegon faris la numismato Daniel Dančev el Smoljan. La ĉeestantoj starigis demandojn lige kun neklaraj momentoj en la prelego, dividis sperton ktp. Interesan eldiron faris samideano Cvjatko Todorov el Sumen.

Estis faritaj valoraj praktikaj proponoj. S-no Bojaĝev el Plovdiv proponis, ke en la agado de la kolektantoj oni ĉiam pli vaste apliku Esperanton. Dimitar Porojkov el urbo Levski akcentis pri la neceso aranĝi tematikajn ekspoziciojn, kiuj bone efikas sur la patriotisman kaj internaciisman edukadon. Zahari Mitev el Sofio substrekis malfortan ligo-kunlaboron inter la kolektantoj kaj atentigis la ĉeestantojn pri bibliofilio — ankaŭ grava parto de la kolektado. Al la sekcio estraro estis direktita propono pri restarigo de revuo „Kolektanto“ k. a. Praktikajn eldirojn faris G. Litov el Sofio, K. Hlebarov el Petriĉ, G. Vančev el Pleven, Ivan Peev el Burgas k.a.

Omaĝe al la centjara jubileo de Esperanto Boris Angelov ĝojigis la ĉeestantojn per bonege aranĝitaj numismata ekspozicio kaj ekspozicio el koloraj bildkartoj.

Antaŭ la fermo de la renkontiĝo Draguŝko Petrov montris diapozitivon el Pekino kaj aliajn, faritajn survoje al Ĉinio.

Niaj kolektantoj ne preterlasas okazon prezenti sin per sia valoro kontribuado antaŭ la Esperanta publiko. Hristo Dolčinkov ekz., partoprenis per sia unika kolekto de lernolibroj en la ĉi-jara PARE en Ruse. La ekspozicion inaŭguris la prezidanto de BEA Hristo Gorov. Ĝin vizitis multaj esperantistoj kaj neesperantistoj. Georgi Litov aranĝis ekspozicion el jubileaj materialoj en Jambol, per kiu li pliriĉigis la virinan renkontiĝon, okazinta la 16—17-an de majo j.k.

Tio estas la kontribuado de nia sekcio al la celebrado de la 100-jara jubileo de Esperanto.

Zora OŠANSKA

HONORE AL LA 100-JARIGO DE ESPERANTO

La celebradon de la 100-jara jubileo de Esperanto (1-3-an de majo j. k.) unua en Sovetunio organizis la ĉefurbo de Ukrainio Kievo: la prezidantaro de la Ukraina Respublika Filio de ASE kaj la MEM-sekcio de URF samtempe ĝin kun la Unuamaja festo de paco kaj solidareco de ĉiuj laboruloj en la mondo.

Kievon amase alvenis E-aktivuloj el ĉiuj regionoj de la respubliko. La solena kunsido dediĉita al la 100-jariĝo de Esperanto okazis la 1-an de majo en la plena salono de la nove konstruita 7-etaĝa komforta hotelo „Avangardo“, kie loĝis la E-gastoj.

La jubilean feston malfermis per trafa enkonduka parolado la prezidantaro de URF ASE E. Majburova. Poste sekvis enhavoriĉa raportoj pri historio de la E-movado en la mondo kaj en Sovetunio, precipe en Ukrainio, de la prezidanto de ukraina MEM-sekcio de ASE V. Paĉjurko el Lvova regiono. Kaj samvespere la ĉeestantoj ĝuis koncerton de la amatora arto de E-klubo de Ukrainio.

La 2-an kaj 3-an de majo okazis scienca E-konferenco, dum kiu interesajn raportojn-paroladojn faris: V. Miŝenko, sciencisto-fizikisto, vicprezidanto de URF ASE, pri la temo: „Kieva E-klubo „Verda Stelo“ (1907—1917)“; instruisto el urbo Harkovo D. Cibulevskij: „Foliumante la malnovajn E-revuojn“; la docento-hemiisto V. Halinker: „E-literaturo en bibliotekoj de Sovetunio“. Krom tio, ampleksan kaj riĉenhavan paroladon „Soveta poeto-internaciisto Eŭĝeno Miĥalskij kaj lia loko en la originala E-poezio“ faris la kandidato de fizikaj-matematikaj sciencoj M. Belogolovskij, kaj pri siaj sperto kaj metodo de laboro kun E-komencantoj de elementaj E-kursoj interese rakontis la juna instruistino-lingvistino S. Pogorelaja.

Post la raportoj sekvis pridiskutado, libera interŝanĝo de opinioj, diversaj anoncoj ktp.

Dum la printempaj festaj tagoj regis vere amika etoso.

La solenan kunsidon, krom la multnombraj delegitoj, gaste partoprenis ankaŭ estraranoj de la Respublika Profesia Unio de Ukrainio, kies financa helpo ebligis ĉi-arangon, kaj ĝia prezidanto k-do Kulik varme salutis la partoprenantojn en la festa E-konferenco kaj promesis ĉiaspecan helpon en la nobla, progresema agado de ukraina esperantistoj, celita al interpopola paco, amikeco kaj interkompreniĝo tutmonda.

Esperable de nun plialtiviĝos ankaŭ la Esperanta kultura, kaj eldona agado en Ukrainio.

Nadija ANDRIANOVA

Novaj libroj

Nikola Aleksiev. Esperanto 100-jara. 1887-1987. Bulgarlingva eldono. Eldonanto: BEA, Sofio, 1987. Paĝoj: 233. Prezo: 0,35 lv. Formato: 13,5×20 cm.

La broŝuro „Esperanto 100-jara“ celas doni al la vasta publiko en Bulgario fidelan kaj laŭeble planan ideon pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj pri la E-movado, kiu ĉi-jare festas sian 100-jaran jubileon.

Por esperantistoj kaj amikoj de Esperanto ĝi estos tre utila en ilia propaganda kaj varba laboro.

Belka Beleva. Teatro sen lingva bariero. Travivitaj rememoroj. Redaktoro: Kunčo Vălev. Eldonas: Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1986. Paĝoj: 127. Prezo: 0,95 lv. Formato: 14,5×21 cm.

Tiuj memuaroj, jam delonge atendataj, prezentas momentojn el la historio de BET, tra la rigardo de du el ĝiaj plej eminentaj aktoroj — Belka Beleva kaj Anani Anev. Sur ĝiaj paĝoj abundas nomoj, datoj,

okazintaĵoj, faktoj. Vigla kaj atentokapta rakonto, freŝa kaj alloga lingvaĵo.


Vasja Cvetkova. Vojaĝimpresoj pri Japanio. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1986. Paĝoj: 68. Prezo: 3,60 lv. Formato: 13,5×20 cm.

Vasta bildo de la ĉiutaga vivo de japanoj, multaj konkretaj faktoj — tra la prismo de persona rilato de la aŭtorino al ĉio vidita dum unumonata vojaĝo tra Japanio. Belaspekta kolora kovrilpaĝo kaj dudeko da koloraj fotoj ege plivalorigas la libron.

Nevena Nedelčeva. Dum nokta deĵorado. Noveloj kaj teatraĵetoj. Hungara Esperanto-Asocio. Budapeŝto, 1987. Paĝoj: 87. Prezo: 2,40 lv. Formato: 13,5×27 cm.

La noveloj de Nedelčeva ĉerpas siajn temojn el la ĉiutaga vivo, ili prezentas ŝajne ordinariajn, sed ofte sortodecidajn momentojn. Emocia rakonto, verva, nuancoriĉa, tamen facila lingvo.

L. RAEVA



Nia kunlaboranto Viktor Soloveĉik el Sofio, 22-jara juristo, afable disponigis al ni unikan foton: grupo da bulgaraj esperantistoj — partoprenintoj en la II bulgara karavano al la Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo (Pollando), 1931, antaŭ la naskiĝ-domo de L. L. Zamenhof en Bjalistoko. La unua dekstre sur la foto estas Lazar Soloveĉik — la avo de Viktor, kaj la knabo en la mezo estas lia patro.

Se iu el la partoprenintoj en la karavano (sur la foto) rekonos sin, la redakcio petas lin sin anonci per letero, aŭ persone.

DISTINGITA AKTIVULO DE BEA

Okaze de la Tago de la Bulgara Scienco kaj Kulturo — la 24-a de Majo, la Stata Soveto de P.R. Bulgario dekoris per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I-a grado, la aktivulon de nia societo „Radio“ kaj prezidanton de la Distrikta Estraro de BEA en Pazarĝik Petko Arnaudov pro lia multjara organiza laboro por stabiligo de la Asocio de Bulgaraj Matematikistoj kaj pro lia krea laboro kiel matematikisto (aŭtoro de kelkaj fakaj libroj, de pluraj artikoloj en matematikaj eldonoj kaj de prelegoj en konferencoj).

La redakcio de „BE“ gratulas sian fidelan kunlaboranton Petko Arnaudov, bondezirante al li sanon kaj multajn novajn sukcesojn.

Informoj el Ruse

UNUA LEGEJA E-KLUBO EN BULGARIO

La 13-an de majo en la Popola Legejo „Zahari Stojanov“ en urbo Ruse per la helpo de aktivuloj-esperantistoj estis fondita la unua en la lando Legeja Esperanto-Klubo kun 12 fondintoj. La kunvenon malfermis la sekretario de la legejo Aneta Vasileva. Raporton pri la celoj de la klubo faris Jordan Kalinov. Sekvis elekto de Kluba Estraro: prezidanto — d-ro Stanko Iliev, sekretario — Jordan Kalinov, E-veterano, batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo; membro-respondeculo pri la ligoj kun artaj institutoj — Mariana Dimitrova, aktorino en la Stata Pupteatro kaj vicprezidantino de Esperanta Klubo „La Trezoro“ ĉe la Pupteatro.

La unuaj donacintoj de Esperanto-libroj kaj gazetoj por la Esperanta fako de la legejo estis Jordan Kalinov kaj St. Cankov.

Ciun duan kaj kvaran ĵaŭdon de la monato en la legejo okazos klubaj kunvenoj kun varia programo: novaĵoj, gramatikaj ekzercoj, lingvaj viktoriaj kun premioj k. a. Komence de la aŭtuno oni organizos kvar-talajn Esperanto-kursojn por komencantoj kaj progresintoj.

Okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto la nova klubo alvokas pri fando de similaj legejaj kluboj en la lando kaj proponas korespondajn kontaktojn. Nia adreso: 7005 Ruse-5 Narodno ĉitaliŝte, „Zahari Stojanov“

UNUA E-KLUBO ĈE PUPTeatRO

En la longjara historio de la Stata Pupteatro en Ruse la tago 28-a de aprilo 1987 estis inter la tagoj skribitaj per grandaj literoj. Ĝi estas naskiĝtago de 12-membra E-klubo „La Trezoro“ ĉe la pupteatro, fondita laŭ iniciato de Jordan Kalinov kaj la operkantistino Jana Cikalova. Jordan Kalinov estas tradukisto de la du E-teatraĵoj prezentitaj de la pupteatro — „La neĝa reĝino“ (1971) kaj „La trezoro“ (1987). Estraro de la klubo: prezidanto — Violeta Frateva, vicedirektoro de la teatro, vicprezidanto — la aktorino kaj ĉefrolulino en la spektaklo „La trezoro“ — Mariana Dimitrova, sekretario — la aktorino Daniela Cekova kaj membro — la juna aktoro David Alorandari.

La fondkunvenon partoprenis kaj membriĝis ankaŭ la direktoro de la teatro Krum Gergicov, la unua maldekstre sur la foto. Laŭ la fonda protokolo la klubo estas kolektiva membro de la Urba Esperanto-societo „Libero“, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“, kaj al la Nacia Sekcio de Artagantoj-Esperantistoj ĉe BEA. La klubanoj jam surbendigis sian duan teatraĵon „La trezoro“ en Esperanto.

La Esperanto-Klubo ĉe la pupteatro en Ruse estas preta gasti al esperantistoj en la distrikto, kaj al aliaj distriktoj en la lando. Adreso: 7000 Ruse, ul. „Dimitar Blagoev“, Dārjaven Kuklen Teatr.

Jordan KALINOV



Kie • Kiam • Kion

HER'87

La 2-a Harca Esperanto-Renkontiĝo okazos de la 9-a ĝis la 11-a de oktobro 1987 en la pitoreska florujo Quedlinburg en Harc-montaro.

Lokoj: 60

Programo: prelegoj; interkona kaj amuza vesperoj; trarigardo de la urbo kun vizito de vidindaĵoj: kastelo, katedralo, kriptoj, muzeoj, galerio; ekskurso al Thale kaj telfera veturo al „Sorĉistina Dancejo“, migrado tra la sovaĝe romantika valo de Bode-rivero.

Informas: Klaus Klimt, Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Subdistrikta Estraro, Marktstr. 2 PF 89, Quedlinburg, DDR-4300

SLAVA LITERATURO EN ESPERANTO

Sub tiu ĉi titolo, okaze de la centjariĝo de Esperanto, Andy Künzli — ĝenerala sekretario de Svisa Esperanto-Societo kaj redaktoro de „TEJO-tutmondo“, prezentis ekspozicion „Slava literaturo en Esperanto dum 100 jaroj“ enkadre de la Slava Seminario organizita en la Universitato de Zŭrich, kie li studas.

En la ekspozicio estis prezentitaj ankaŭ kelkaj bulgaraj libroj en Esperanto: „Sub la jugo“, „Elektita Verkaro“ de Hristo Botev, Antologio „Nuntempa bulgara literaturo“, revuo „Bulgara Esperantisto“, „Prospekto pri bulgara arkitekturo“, „Konstitucio de PRB“ k. a.

AL VIA ATENTO

Se vi volas senpage ricevi la broŝuron „Raporto de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio antaŭ la Dektria partia kongreso“ (138 pĝ), en Esperanto, skribu legeble vian adreson al:

KOMUNISTA ESPERANTISTA KOLEKTIVO
p. k. 25
1309 Sofio — Bulgario

Tra la gazetaro

En Sofio:

Ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“ (31. V. 1987) aperigis informon pri la tradicia Botev-recitalo en Esperanto enkadre de la naciskalaj kulturaj aranĝoj „Botev-tagoj 87“ en u. Vraca; pri la sama temo skribis ankaŭ j. „Oteĉestven Front“ (29. V. 1987); Uzina gazeto „Transportna Iskra“ de Sofia urba transporto (18. V. 1987) presigis detalan informon de Lasto Nikov pri jubilea aranĝo de la uzina E-societo „Verda Tramo“.

En la lando:

Ĵurnalo „Dunavska Pravda“ — u. Ruse (10. V. 1987) detale informis pri tradicia Printempa Esperanto-Renkontiĝo en u. Ruse, dediĉita ĉi-jare al la centjara jubileo; j. „Naroden Drugar“ — u. Jambol (14. II. 1987) en sia monata aldono „Tunĝa“ aperigis grandan artikolon de Dimo Trudoljubov pri la traduka kaj koresponda aktivado de la pioniro Penko Petrov el Jambol; la urba gazeto „Botevgradski Plamâk“ — u. Botevgrad (14. II. 1987) donis lokon al informo kun foto pri solenaĵo okaze de transdono en posedo de la ŝtato de la domo, en kiu loĝis la konata publicisto-esperantisto Trifon Hristovski en v. Radotina. La donacon faris lia fratino Cveta Koceva; la sama gazeto (16. V. 1987) aperigis artikolon pri la esperantisto-antifaŝisto Kostadin Bukovski el v. Litakovo, peinte en la Patrolanda Milito en oktobro 1944; la urba gazeto „Drjanovska Iskra“ — u. Drjanovo (12. II. 1987) donis lokon al trikolumna artikolo de Janeta Mihova pri la vasta internacia agado de la loka E-societo „Ivan Vladkov“.

ENHAVO

II Emocia jubilea festo (Donĉo Hitrov)

1 Esperanto-instruado kaj nuntempaj postuloj (Nedka Valjaviĉarska)

3 Botev vivas en niaj koroj (Evĝeni Ĝeorgiev)

4 Nia alvoko (Mariana Elenova)

5 Vasja Cvetkova jubileas (Kunĉo Vălev)

6 La neforgesebla Maria Gavrilova (Ivanka Gavrilova)

7 Niaj veteranoj: Kaljo Bjandov — 70-jara (Nikolaj Stranganski); Gratulojn, Belka! (Bojidar Aleksiev)

8 Esperantistinoj jubileas (V. Antonova)

9 Literaturaj tagoj „Penjo Penev“ (Ĝeorgi Mihalkov)

10 Lingvaj demandoj: Pri la propra nomo de Zamanhofa planlingvo (Canko Murgin)

12 Originala verkaro: „Renkontiĝo“ (Nevena Nedelĉeva)

13 Ni recenzas: La verda pado de la verkisto (G. Iliev)

14 Nia intervjuo: „Ni konstruu pacan mondon!“ (Petra Milanova)

14 Jubileaj celebradoj

IV Go — arto de la harmonio (Velko Miloev)

Sur la unua kovrilpaĝo:

Solenaĵo en la Nacia Palaco de Kulturo „Ljudmila Jivkova“ en Sofio, omage al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj al la 80-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio.

Foto: Borislav Skoĉev

NI KONDOLENCAS

La 27-an de aprilo 1987 en Sofio en sia 86-jara aĝo forpasis la veterano ANTON GENOV, emerita instruisto el Nova Zagora.

Filo de laborista familio, li partoprenis la Septembran Kontraŭfaŝistan Ribelon en 1923, aktivis poste en la laborista movado, pro kio estis severe persekutata, turmentata kaj eksigita de la instruista posteno.

Esperanton li eklernis en 1923 jaro kaj estis unu el la kunfondintoj de la loka Esperanto-societo „Edmon Privat“ en u. Nova Zagora. Partoprenis kelkajn Universalajn Kongresojn, gastigis multajn eksterlandajn esperantistojn. Per biciklo li veturis en kelkaj landoj, ankaŭ en Bulgario, kaj propagandis pri Esperanto. Li gvidis multajn Esperantajn kursojn en lernejoj kaj por civitanoj, aranĝis propagandajn ekspoziciojn en urboj kaj vilaĝoj. Li estis multjara prezidanto de la E-societo en sia naskiĝurbo. La bulgaraj esperantistoj konservas bonan memoron pri lia abnegacia kaj fruktodona poresperanta agado.

La Redakcio

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAĈEV, Mariana ELENOVA, Dimitar HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

GO — ARTO DE LA HARMONIO

Kun intereso ni tralegis en n-ro 5/1986 de ĵurnalo „ABC“ la artikolon „La ludo Go“. Estas laŭdinda la fakto, ke la ĵurnalo strebas informi la bulgaran legantaron pri la sukcesoj de popularigo de tiu ludo.

Ni permesos al ni atentigi, ke ĝi tute ne estas nekonsistanta ĉe ni. La komenco de ĝia disvastigo estas melita antaŭ ok jaroj en la malgranda urbo Dve Mogili, distrikto de Ruse, de la instruisto Nejko Radkov Nejkov.

Dum la Internacia Esperanto-kongreso en Varna, 1978, li konatiĝis kun la japana esperantisto kaj Go-ludanto Minosuke Emori el Tokio. Pere de korespondado kun li kaj helpe de la ricevata literaturo Nejkov ellernis la ĝeneralajn regulojn de la ludo. Pli malfrue li ricevis donace Go-kompleton de sia soveta amiko Aleksandr Gončarov, programisto en la Akademio pri Nacia Ekonomio.

Jam en la unuaj jaroj post ekposedo de la ludo li komencis instrui ĝin al siaj lernantoj el lernejo „Kiril i Metodij“ en Dve Mogili. En 1986 N. Nejkov komencis la preparadon de la kvara laŭvica grupo da lernantoj — go-ludantoj.

Laŭ lia iniciato kaj dank' al la kunlaboro de Karel Schulz el Karlovy Vary antaŭ du jaroj estis organizita la unua en sia speco en Eŭropo korespondanta Go-turniro sur malgranda tabulo, kiun partoprenis ok ludantoj el la socialismaj landoj, inkluzive du konkurantojn el Bulgario.

Tamen, la disvastigo de la ludo Go nur en esperantistaj medioj limiĝos ĝian popularigadon. Estas tempo sekvi la ekzemplon de Sovetunio, kie estas organizita Go-sekcio.

La junularo interesiĝas pri la ludo.

(El la letero de G. Krástev, prezidanto de la Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto en Dve Mogili, distrikto de Ruse)

„Kiam oni ludas Go, estas egale malbone esti malprudente kuraĝa aŭ tro malkuraĝa, avida aŭ superflue malŝparema, tro aktiva aŭ pasiva. Go ne toleras la ekstremeojn — nur „la ora mezo“ povas garantii la sukceson. Kiam ni alktimigiĝas deteni niajn emociojn dum la ludado, ni povos deteni ilin ankaŭ en la vivo kaj inverse“. Tio estas vortoj de V. Astaskin kaj G. Nilov, kies publikigaĵoj en revuo „Nauka i Žizn“ („Scienco kaj vivo“) dum 1975-1976 sub titolo „Lernejo pri Go“ provokis grandan intereson. Se la ludo Go vere povas instrui la homon vivi, kiel asertas japanoj, eble tio estas unu el la kaŭzoj, ke ĝi konserviĝis preskaŭ neŝanĝita en daŭro de pli ol kvar jarcentoj, gajnis grandegan popularaĵon dum la jarcentoj kaj precipe hodiaŭ.

La ludo Go aperis en Ĉinio, kaj en la komenco de nia erao enpenetris Japanion, kie majstra ludo de Go iom post iom estigis mezurilo pri la intelekta nivelo de la homo. La kvalifika sistemo, kiu havas sian komencon en la XII jarcento, inkluzivas naŭ majstrajn kategoriojn por profesuloj, naŭ majstrajn kategoriojn por amatoj kaj 12 ordinarnajn kategoriojn — kju. En Ĉinio la instruado de Go estas enkondukita en la lernejojn vice kun la ĝeneralklerigaj objektoj.

En la fino de la pasinta jarcento Go forlasas la limojn de la Malproksima Oriento por komenci triumfe gajni adeptojn en Eŭropo. Nun ekzistas Internacia kaj Eŭropa Federacioj de Go. En la Internacia Federacio membras 31 landoj de kvar kontinentoj, okazis jam 7 tutmondaj kaj 29 europaj ĉampionecoj. En multaj urboj de Sovetunio estas organizitaj sekcioj kaj kluboj de Go, en la magazenoj por sportaj varoj oni vendas kompletojn por la ludo, oni organizis konkuradon kaj ĉampionecojn.

Kion finfine prezentas Go? Ni povas nomi ĝin konkura logika ludo, amuziga, matematika, intelekta, surtabla ktp., sed la difinoj preskaŭ nenion klarigos al ni. Preferinde ni provu tute suprajne priskribi ĝin. La konkuraj pasioj ekfuriozas aŭ, kiel ni jam komprenis, pli prave dirite estas detenataj apud ordinara tabulo desegnita kun 19 horizontalaj kaj 19 vertikalaj linioj. Ili interkruciĝas en 361 punktoj, sur kiuj oni sinsekve metas la „ŝtonojn“ (disketojn) de la kontraŭuloj — 180 por la „blankaj“ kaj 181 por la „nigraj“. La ravo de Go estas en la kombino de relative malsimplaj reguloj kun preskaŭ nelimigita nombro de la variantoj, kun riĉaj eblecoj por persona kreado. La ludo komenciĝas sur malplena tabulo. Ambaŭ konkurantoj sinsekve faras po unu movon — metas po unu disketon sur libera punkto de la tabulo, kiun oni ne plu translokiĝas. La celo estas gajni teritorion kaj „konkeri“ disketojn — tiel oni gajnas poentojn. Unu aŭ kelkaj disketoj estas pritaksataj neniigitaj kiam estas ĉiufanke ĉirkaŭitaj de disketoj de la malamiko. Kaj „teritorio“ estas parto de la tabulo „ĉirkaŭita“ per disketoj tiel, ke la „malamiko“ ne povu enpenetri internen aŭ, se li farus tion, li estus „neniigita“. La ludo daŭras ĝis kiam la pliparto de la tabulo estas plenigita kaj ne plu ekzistas movoj, kiuj alportas poentojn al la konkurantoj. Kompreneble, en Go estas malpermesitaj movoj, kontrolo de la tempo, estas ankaŭ reguloj, kiuj ebligas streĉajn duelojn inter kontraŭuloj diversklasaj — la pli malforta el ili ricevas avantaĝon de kelkaj movoj en la komenco. La maniero por difino de tiu avantaĝo kuŝas en la fundamento de la kvalifika sistemo. Dum unu turniro ĉiu ludanto strebas ne nur gajni la laŭvican partion, sed ankaŭ okupi pli bonan lokon en la kvalifiko.

Ĉio ĉi faras la ludon aparte interesa. Laŭ malsimpla de la solvataj taskoj Go ne cedas al la ŝakludo kaj nature ankaŭ ĝi havas riĉajn teorian, strategian kaj taktikon. Tamen ne estas devige, ke oni sciu parkere ekzemple la manierojn por ludo en la komenca fazo (fuseki) kaj en la fina fazo (jose). Oni povas kompreni tion per intuicio. La intuicio en Go estas nomata harmonio. Ĝi estas fundamenta principo de la ludo kaj privilegio de la majstroj. La harmonio ĉe konstruo de la propra pozicio aŭ de la aparta movo, plej ĝenerale dirite, signifas, ke ĉiu disketo devas esti sur sia loko. Oni diras, ke ju pli la ludanto regas la komprenon pri harmonio, des pli malmulte li okupiĝos pri pedanta kalkulado de la diversaj variantoj. Kaj unu el la fundamentaj ludmanieroj en Go estas nomata tesuĝi — „admirinda movo“.

Ĉu ankaŭ ni povas lerni la ludon Go? Estas konvene, ke la lernado komenciĝu sur malgranda tabulo (13×13 aŭ eĉ 9×9 cm). Plej grava por atingi de majstreco estas la nombro de luditaj partioj, tial oni rekomendas organizadon de turniroj inter kelkaj konkurantoj. Gravan atenton oni turnas al la solvado de etudoj kaj taskoj, kiel en la ŝakludo. La bazajn problemojn pri la teorio de Go oni povas trovi en la supre menciitaj publikigaĵoj en revuo „Nauka i Žizn“ (de numero 8/1975 ĝis numero 7/1976). Estas prezentitaj multaj informoj pri la ludo — reguloj, taktiko, multaj ekzemploj kaj taskoj kun iliaj solvoj. Pro la granda intereso, montrita fare de la sovetaĵ legantoj, de la komenco de la pasinta jaro (1986) en la rubriko „Logikaj ludoj“ la revuo komencis publikigadon de nova serio de materialoj pri Go, preparitaj de elstaraj majstroj de la ludo en USSR. Ankaŭ tiu serio komenciĝas per la plej simplaj reguloj kaj la fundamentoj de la teorio ĉe iompostioma komplikiĝo de la solvataj problemoj kaj proponataj taskoj.

Velko MILOEV
(Laŭ materialoj de la soveta gazetaro)